MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

E

HUNGARA VIVO

4
1971

DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA SUPER BENZINO 98.
EKSTRABENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN"

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

UNUA BULTENO

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

—SUB AŬSPICIO DE UEA—

Budapest, 17-23. julio 1972

HUNGARA MOND-MARKO ORION

ORION Radio kaj Elektroteknika Entrepreno estas unu el la plej signifaj komunikteknikaj fabrikoj en Mez-Eŭropo.
La fabriko estis fondita en 1913, do post nelonge ĝi povos festi la 60-jaran jubileon de sia ekzisto. La tempopunkto de la fabrik-fondo koincidis kun la tutmonda granda ekfloro de la elektra industrio. La fabriko ORION, ekde sia ekzisto, produktis ĉiam aparatojn, instalaĵojn kaj konsistaĵojn koneksajn kun la elektro. En la unuaj jaroj ĝi komencis sian laboron per produktado de elektraj lampoj kaj de ŝaltiloj koneksaj kun la elektra lumigado.
La unua pli granda instalaĵo estis tiu por fabrikado de radio-aparatoj, pri ĝi ORION komencis okupiĝi en 1923. Ĉi tiu tempo estis la komenco de la radiofonio en la tuta mondo. De 1928 la ORION-marko ekiris al la mondmerkato per la eksporto de radio-aparatoj, kies amasproduktadon ĝi komencis en 1926. De tiam la ORION-marko estas konata ne nur en Eŭropo sed en ĉiuj mondpartoj.
La evoluo kaj disvastiĝo de la radiofonio instigis la fabrikon okupiĝi pri produktaĵoj pli evoluintaj ol la radio-aparatoj. Tiel komenciĝis en 1955 la seria produktado de la televid-aparatoj en la fabriko ORION kaj en Hungario.
Dum la preskaŭ 40 jaroj de la ORION-fabrika produktado de radio-aparatoj, pli ol 200 diversaj aparato-tipoj venis en la merkaton kaj ilia kuna kvanto superas 5 milionojn da pecoj.
La televid-aparatoj de ORION tre baldaŭ fariĝis ŝatataj enkaj eksterlande. Por kontentigi la dezirojn, mendojn, oni decidis utiligi ĉiujn labor-fortojn por la produktado de televid-aparatoj kaj rezigni pri la fabrikado de radio-aparatoj. De tiam el la televid-aparatoj la fabriko produktis 30 diversajn aparato-tipojn de nigra-blanka televizio, en kvanto de 2 milionoj da pecoj. Ĉi tiuj televidiloj atingis plurajn landojn de Eŭropo, Azio kaj Afriko kaj transprenis tiun rolon de la ORION-marko, kiun kreis la radio-aparatoj.
La ORION-marko nuntempe estas registrita en 72 landoj de la mondo kiel internacie rekonita fabrik-marko.
La ĉeso de la fabrikado de radio-aparatoj kaj la grandskala

KORE NI INVITAS VIN

pasigi tagojn aŭ semajnojn en tri diversaj partoj de nia lando!

BUDAPEST prezentos al vi dum unu tuta semajno hungaran kulturon en la kadro de

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

GYULA aranĝos kun altnivela programo al internacia publiko la 10-an Jubilean Sesion de

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

ABALIGET vokas al turisma kunveno la amikojn de la somera naturo. Kvinan fojon estos aranĝata la

INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ (IREN)

Atentu!

Ĉiuj tri aranĝaĵoj laŭ administrado estas memstaraj, do oni devas aliĝi aparte al ili laŭ la adresoj en Budapest, Gyula, Abaliget — per apartaj aliĝiloj.

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

— sub aŭspicio de UEA —
Budapest, 17—23. julio 1972

BUDAPEST

Ĉefurbo de Hungara Popolrespubliko, sidloko de la registaro, de ĉiuj ĉefoficejoj, ekonomiaj, politikaj, kulturaj institucioj de tutlanda karaktero. Budapest situas en la Karpat-baseno, sur ambaŭ bordoj de Danubo. La dekstra, montriĉa bordo, Buda, kaj la maldekstra ebena bordo, Pest iam estis du memstaraj urboj. Ili unuiĝis en 1872. De tiam kelkaj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj aliĝis al la ĉefurbo. Nuntempe Budapest havas 525 km^2 da areo, kaj du milionojn da loĝantoj.
Nia ĉefurbo — kiel karakterize moderzona urbo — havas bonegan klimaton por la fremdultrafiko: la meza temperaturo en julio estas 22 C°. De jaro al jaro ĉiam pli kaj pli da enlandaj kaj eksterlandaj turistoj vizitas la ĉefurbon.
La historiaj monumentoj troveblaj en la urbo memorigas nin pri la pasinto de la lando.
El la romia epoko (de la 1-a ĝis la 4-a jarcento) restis al ni la ruinoj de la soldata tendarurbo, Aquincum. Meze de la ruinkampo de Aquincum leviĝas nova muzeo, en ĝi estas videblaj multaj antikvaj memorajoj trovitaj en la ĉefurbo.
Ĉirkaŭ 150 jarojn post la patrujokupo fare de la hungaroj, dum regado de Stefano la Unua (1001—1038) komenciĝis tiu procezo, al kiu ni povas danki la pluan grupon de la historiaj monumentoj. Ekregis la romanika stilo, sed ties memorajojn detruis la tatara (mongola) invado (1241).
En la 13-a jarcento jam la gotiko influis la hungaran konstruarton. Plimulto de ĉi tiuj monumentoj postrestis en la fortikajo de Buda. El ili la plej grandioza estas la Matias-preĝejo. La konstruon de la Fortikajo komencis post la tatara invado reĝo Adalberto la Kvara. La mezepoka fortikajo kaj palaco poste preskaŭ tute ruiniĝis aŭ estis rekonstruita de aliaj reĝoj laŭ diversaj stiloj.
La vicon de la mezepokaj historiaj monumentoj kompletigas la ruinoj de la Dominikana monaĥinejo kaj preĝejo sur la Margaretinsulo, la ruinoj de la prepostejo Sankta Petro en Óbuda kaj tiuj de la preĝejo en Budaszentlőrinc apartenanta al la sola hungara ordeno nomata pri Paŭlo.
La renesanco — ĉefe dum la regado de Matiaso 1440—1490 — kun itala ĉarmo dekoris la urbon. Sed la turka konkero (1541) kaj la postaj sieĝoj ĉion neniigis. La turkoj lasis post si moskeojn, mina-

retojn kaj banejojn. La moskeoj kaj minaretoj en la ĉefurbo mem ne postrestis, sed la banejoj: laŭnome „Rudas", „Király", kaj „Rác" eĉ nun funkcias.
Granda parto de niaj historiaj monumentoj konstruiĝis en la epoko de baroko. Tiu stilo komenciĝis ĉe ni nur post la ĉeso de la turka subpremo (1686) kaj daŭris ĝis la fino de la 18-a jarcento.
Konsiderindan sanĝon kunportis la klasikismo en la 19-a jarcento. Krom la konstruado de ludomoj estas karakterizaj la grandiozaj ŝtataj konstruadoj, ekzemple la palaco de la Nacia Muzeo.
Sekvas novaj stiloj, al kiuj ni povas danki kelkajn artobjektojn kiel la Fiŝkaptisto-Bastiono, la Parlamentejo kaj la Operdomo.
Al la 20-a jarcento apartenas la „moderna stilo". Precipe post la dua mondmilito — kiu ruinigis preskaŭ la tutan urbon — la modernaj klopodoj staras en la servo de la socio. Loĝkvartaloj, kulturaj kaj sportaj institucioj kreiĝas zorgante pri kontentigo de la pretendoj de la loĝantaro.
Do, la jarcentoj elformis la nuntempan aspekton de nia ĉefurbo, sed mem la eksterordinare belega situo de la urbo estas kreita de la naturo. Trafe oni nomas Budapeŝton „Perlo de Danubo"...
Kaj ne forgesu, ke ankaŭ en la ĉefurbo vivas la mondfama „hungara gastamo", en kies signo ni atendas la geamikojn el ĉiu parto de la mondo.

PROVIZORA PROGRAMO

LUNDO, 17. 7.

Posttagmeze: — Solena inaŭguro
Vespere: — Interkona vespero

MARDO, 18. 7.

Antaŭtagmeze: — Vizito de bildekspozicio en la Belarta Muzeo
— Enketo por la verkistoj, ĵurnalistoj, artistoj partoprenantaj en la HKF: "Rolo de la esperantista artisto en la movado"

Posttagmeze: — Malfermo de ekspozicioj kun gvidado:
— Folkloro
— Esperantistaj belartistoj
— Foto
— Literatura programo "Perloj de la hungara literaturo" (De la komenco ĝis 1945)

Vespere: — Liberaera koncerto

MERKREDO, 19. 7.

Antaŭtagmeze:	— Vizito al la Hungara Nacia Galerio kaj al la Parlamentejo
Prezentado:	— Kantoj kaj ĥoroj
Posttagmeze:	— Literatura programo: „La nuntempa literaturo en la Hungara Vivo" (HV prezentas la nuntempan hungaran literaturon)
Vespere:	— Filmprezentado

ĴAŬDO, 20. 7.

EKSKURSA TAGO	— Elekteblaj programoj: (aparte mendebla) 1. Vizito al Esztergom kaj Visegrád 2. Vojaĝo al Balatono 3. Vizito de hungara pejzaĝo: specifaj manĝaĵoj, ĉevalrajdado kaj aliaj

VENDREDO, 21. 7.

Antaŭtagmeze:	— Vizito al la Historia Muzeo (Fortikaĵo de Buda)
Posttagmeze:	— Teatra programo
Vespere:	— Folklor-programo
Vespere, malfrue:	— Beat nokto por la junularo

SABATO, 22. 7.

Anatŭtagmeze:	— Pupteatra prezentado
Posttagmeze:	— Filmprezentado
Vespere:	— Muzika vespero de fortepian-artisto Imre Ungár

DIMANĈO, 23. 7.

Antaŭtagmeze:	— Ferma kunsido
Posttagmeze:	— Elekteblaj programoj: — Ekskurso al la Esperanto-fonto — Danuba promenado per ŝipo

Okazos laŭdezire kunvenoj de diversaj fakorganizaĵoj.
Por ili ni certigas lokon. Urborigardoj ĉiutage!

10-A JUBILEA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

GYULA

9—15. julio 1972

En 1972. okaze de la jubilea jaro, jam la dekan fojon ni aranĝos la internacie fame konatajn kulturajn tagojn de la Somera Esperanto-Universitato en urbo Gyula.
Ĉi tiu ĉarma, historia ĝardenurbo kun siaj artobjektoj, variaj amuzeblecoj, strand-, kurac-, kaj termalbanejo ĉiam garantias ankaŭ la amuziĝon kaj ripozon de la vizitantoj.

Programprojekto de la prelegoj:

1. Hungaraj pejzaĝoj — VI-a parto: Nordhungario
2. Grandaj muzeoj de la mondo — I.: Belarta Muzeo de Budapest
3. Folklora arto — IV.: Hungara popola brodado
4. Klasikuloj de la mondliteraturo III.: Shakespeare
5. Esperanto en la praktiko
6. Laŭ la Blua Danubo II.
7. Dek jaroj de SEU
8. Eminentuloj de la scienco: János Bólyai
9. Hungara gastronomio

Gvidpreleganto: prof. d-ro Ivo Lapenna

Kondiĉoj de la aliĝo:

Aliĝoj okazas per aliĝiloj (aŭ per ĝiaj kopioj letere kaj poŝtkarte). Bonvolu sendi la aliĝilon al la adreso:

Somera Esperanto-Universitato — TIT-
Gyula, 48-as u. 11.
Hungario

Aliĝojn ni akceptos nur ĝis la 31-a de majo. Aliĝojn ni konfirmas.
Detalan informon kaj aliĝilon petu de la organizanto:
SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO, Gyula, 48-as u. 11.

5-A INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ (IREN)

ABALIGET

24. julio — 2. aŭgusto 1972

Abaliget, la malgranda vilaĝo, situas 200 km-ojn sud-okcidente de Budapest, kaŝas sin sur la mildaj deklivoj de nia plej bela montaro, Mecsek.

Ĉiujare kreskas la nombro de la partoprenantoj de IREN. Kiu foje vizitis nin, neniam forgesas la agrablajn tagojn, pasigitajn en bela naturo, en vera internacia atmosfero. La partoprenantoj vivas komforte, ripozas, promenas, ekskursas, partoprenas la amuzajn programojn aŭ vizitas la proksime situantan belegan urbon, Pécs, plena de arthistoriaj monumentoj.

Programo

Lundo, 24. 7.	je la 20-a solena malfermo
Mardo, 25. 7.	ekskurso en la groton
	ripozo, sinbanado, naĝado en la lago
	vespere film- kaj diaprezentado
Merkredo, 26. 7.	tuttaga ekskurso al lago "Pécs"
Ĵaŭdo, 27. 7.	tuttaga autobusekskurso en la departemento
Vendredo, 28. 7.	turisma konkurso
	vespere sur la lago solenaĵo kun lampionoj.
Sabato, 29. 7.	duontaga ekskurso
	pupteatra prezentado
	Hungara Vespero: florkloraj dancoj
Dimanĉo, 30. 7.	Ripoztago
Lundo, 31. 7.	tuttaga perpieda ekskurso
Mardo, 1. 8.	lingvoekzamenoj
	malferma solenaĵo
	nokta ekskurso
Merkredo, 2. 8.	vizito al Pécs

Estas menciinde, ke de la 10-a ĝis la 20-a de julio 1972. okazos la Internacia Tendumado de Esperantistaj Pioniroj en pitoreska arbara banloko Sikonda (apud Pécs).

Kondiĉoj de la aliĝo

Aliĝoj okazas per aliĝiloj. Aliĝilojn kaj detalan informon bonvolu peti de la organizanto:

HEA 3-a TERITORIA KOMITATO
Pécs 1. Poŝtfako 2.
Hungario

ALIĜILO

Hungara Kultur-Festivalo
— sub aŭspicio de UEA —

BUDAPEST
17—23 julio 1972

Adreso de la Festivalo: Hungara Esperanto — Asocio
BUDAPEST 5. Pf. 193.

Mi aliĝas al la Hungara Kultur-Festivalo kaj samtempe pagas la sumon de 240.— forintoj, respektive 30.— guldenoj aŭ egalvaloron al la adreso de (vidu dorsflanke)

Familia nomo, S-ro, S-ino, F-ino (nepre forstreku du) .....

Antaŭnomo: .....

Profesio (en Esperanto, nur por statistiko) .....

Strato kaj numero .....

Urbo (en latinaj literoj) .....

Provinco (kie necesas por la poŝto) .....

Lando (en Esperanto) .....

Naskiĝjaro (nur por statistiko) .....

Al kiu esperanto asocio (societo) Vi apartenas? Ekde kiam?

Ĉu Vi deziras tranoktejon? A.) jes
B.) ne (bv. substreki la ĝustan)

Aliĝoj estas akceptataj
ĝis la 1-a de junio .....
Vidu la instrukciojn! subskribo

Notoj por la administracio

Pago ricevita	Aliĝo konfirmo	Statistiko	Hungara Vivo sendita

Tondu ĉi tie!

Aliĝkotizo estas 240.— forintoj, 30.— guldenoj, respektive egalvaloro. Pagojn vi direktu al la jenaj kontoj pere de Hungara Nacia Banko

1. Pagojn el okcidentaj landoj:

   Magyar Nemzeti Bank
   Budapest, Szoc.- Turist
   notu: ESPERANTO

2. Pagojn el socialismaj landoj oni sendu al la poŝtĉekkonto de Hungara Esperanto- Asocio, BUDAPEST 62.
   Nro. 516—10 005
   Por ĉiuj transpagoj nepre indiku *"Kultur-Festivalo"*.

Ĉiuj aliĝantoj rajtas:

a) partopreni la programerojn (aparte pagante la ekskursojn) de la Festivalo,
b) ricevas senpage dum 1972 la revuon Hungara Vivo,
c) rajtas uzi la servojn de la Festivalo
   (Loĝiga, ekskursa kaj aliaj servoj).

Instrukcioj:

1. Ĉiu partoprenanto devas n e p r e plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.

2. Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere. Aliĝiloj ne klare skribitaj, restos netraktitaj.

3. Sendu la aliĝilon rekte al la adreso de
   Hungara Esperanto-Asocio, BUDAPEST 5. Poŝtfako 193. kaj la pagon samtempe al la adreso, ĉi supre montrita.

4. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.

5. La aliĝkotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la Festivalon.

6. La aliĝo kaj partopreno estas strikte persona. Aliĝinto ne povas siajn rajtojn fordoni, vendi aŭ interŝangi.

7. Pro la limigita nombro de partoprenantoj ni rezervas la rajton malakcepti la aliĝon super la limo.

HUNGARA MOND-MARKO ORION

evoluo de la produktado de televidiloj portis kun si — laŭ la gvidlinio de la historio de l' fabriko: produkti ĉiam pli evoluintajn instalaĵojn — la produktadon de la mikro-ondaj instalaĵoj ekde 1963.

La mikro-ondaj instalaĵoj povas estigi tian inform-komunikadon je grandaj distancoj, per kiuj oni povas certigi ĉiujn kondiĉojn de la moderna informsendo kaj inform-transigo. Ili estas uzeblaj por telekomuniko de telefonaj, telegrafaj televiziaj signoj. La mikro-ondaj instalaĵoj nuntempe produktataj de la fabriko, kun sia kapacito de 6—12—24—60—120—300 kanaloj kaj en la strioj de 400—2000—8000 MHz-oj plene kontentigas ĉiujn postulojn metatajn. La mikro-ondaj instalaĵoj de ORION, uzataj en pluraj landoj de Eŭropo kaj Azio, servas ekskluzive por industriaj celoj kaj ĝenerale certigas la interkomunikadon ĉe fervojo, poŝto, elektra reto, gaso kaj oleo-duktoj.

Kelkaj tipoj de mikro-ondaj instalaĵoj pretiĝas por transsendo de televiziaj programoj nigraj-blankaj aŭ koloraj; tie ĉi en la laboro de la fabriko renkontiĝas la produktado de televidiloj kaj la transsendo de programoj.

La produktaĵoj de la fabriko estas rezultoj de propra laboro evoluiga. En la



Televidaparato AT 551

HUNGARA MOND-MARKO ORION

laboratorioj de la fabriko pluraj centoj da inĝenieroj kaj teknikistoj okupiĝas pri la ellaboro de novaj produktaĵoj kaj pri la preparado de ties fabrikado.
En la fabriko nun laboras 4500 personoj. Ĉi tiu granda fabrika kolektivo helpas en Hungario kaj ankaŭ en aliaj landoj la disvastiĝon de kulturo kaj amuzo ĝis la hejmoj de milionoj, ĉu per televidiloj, ĉu per la informkomunikaj instalaĵoj fabrikataj.
El la plej novaj produktaĵoj de la fabriko ni prezentas bilde unu televidilon kaj unu mikro-ondan instalaĵon kiuj ambaŭ estas la plej modernaj fabrikaĵoj de ORION kaj samtempe kreaĵoj rekonitaj en la tuta mondmerkato.
La konata tri-kapa marko de ORION estas ne nur unu el la hungaraj fabrikmarkoj, sed ankaŭ rekonita komunikteknika marko tiel en Hungario, kiel en la tuta mondo.



Mikro-onda instalaĵo KTT 8000 MHz

E HUNGARA VIVO

1971. XI. jaro, 4-a numero

Béla Berceli: Hungara Kultur-Festivalo 1
Provizora programo 2
Gábor Vigh: La prezidanto de nia mondmovado 3
Lajos Galambos: Mono. Tr. K. Kalocsay 4
Gasta paĝo — *William Auld:* Poemoj 7
J. Szekeres: Panoramo 8
Ada Csiszár: Koloroj 10
Dr. István Bácskai: La 56-a Univ. Kongreso 12
Vilmos Benczik: Pasia komunikemo 13
El la artikoloj de *Julio Baghy* . 14
Gm: Gyula Feledy 16
Ervin Fenyvesi: La Komuno de Parizo 18
Kompletigu la jarkolektojn de HV 18
János Tóth: Juneco, juneco . . 20
Lajos Lesznai: Ĉapitroj el la hungara muzikhistorio I. . . 21
1972: Libro-Jaro 21
K. Kalocsay: Bar-Koñba-ludo . 22
K. Tamkó Sirató: Vagabonda Paŭl. Tr. P. Rados 24
T. Ujlaky—Nagy: Sporto . . . 24
Humuro 24
L. Tárkony: Revuo de Revuoj . 25
Najbareco, amikeco 26
T. Kulagin, N. Sulje: E. A. Bokarev (nekrologo) 26
A. Ponori Thewrewk: Poemoj . 27
P. Balkányi: Filmo pri la „stress" kaj ties scienculo . . 27
Recenzoj 28
El la leteroj — Leterkesto—Korespondi deziras 30
Feri: Espero en Esperanto. Kruc-vortenigmo 31

Sur la kovrilpaĝo: La fortikaĵo de Gyula, scenejo de teatraj prezentadoj. (Foto: MTI)

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

–sub aŭspicio de UEA–

Pasis jam kvin jaroj, post kiam ni organizis la 51-an Universalan Kongreson en Budapeŝto. Kun ĝojo ni povis sperti — dum la pli postaj Kongresoj kaj aliloke —, ke la partoprenintoj de la 51-a havas agrablajn rememorojn pri Hungario. Ni ĝojis, kiam ni povis saluti en nia lando amikojn, kiuj refoje vizitis nin.

Kaj ni ĝojis, ke la pasintan jaron ni povis saluti inter la prelegintoj de SEU en Gyula, la prezidanton de UEA, S-ron prof. dr. Ivo Lapenna. Li sugestis organizi ian kunvenon en Eŭropo, por ebligi kunsidojn, renkontiĝon de esperantistoj el Eŭropo. Ja multaj volonte partoprenus la 57-an UK en Portland, tamen pro la relative altaj kostoj estas antaŭvideble, ke ne multaj eŭropanoj povos aliĝi. Post ioma traktado kaj korespondado, ankaŭ la Estraro de UEA aprobis nian proponon, organizi Hungaran Kultur-Festivalon — sub aŭspicio de UEA — en Budapeŝto, inter la 17—23-a de julio 1972.

Per la organizo de la Festivalo ni celas plenumi tri dezirojn:
— prezenti la hungaran kulturon — literaturon, prozon kaj poezion, muzikon, folkloron — al la internacia esperantista publiko,
— doni eblecon por internacia, amika renkontiĝo,
— doni eblecon por la diversaj fakaj kaj aliaj organizoj, laŭdezire havi kunvenon, priparolon de siaj organizaj kaj aliaj problemoj.

Ni opinias, ke unu semajno donos al ni sufiĉe da tempo por plenumi tiujn tri postulojn.

Kompreneble unu semajno tamen ne sufiĉas por prezenti komplete ĉiujn aspektojn de la hungara (aŭ de kiu ajn alia nacia) kulturo. Sed ĝi sufiĉas por gustumi ĝin, ekkoni la plej elstarajn valorojn kaj ekhavi la deziron, konatiĝi pli profunde kun ĝiaj valoroj. Ni intencas prezenti ĉefe la nunan, modernan literaturon, muzikon kaj belartojn, kiuj samtempe informas nin pri la vivo kaj zorgoj de la popolo.

La Organiza Komitato antaŭvidas, ke la interesiĝo de la partoprenontoj estos divers-aspekta. Pro tio ni organizos vizitojn al diversaj lokoj, kaj por ekkoni la naturbelaĵojn de la lando oni povos elekti inter la ekskurs-eblecoj.

Pro la malproksimeco de Portland, verŝajne kelkaj Fakaj Asocioj deziros havi kunvenon por priparoli siajn problemojn. Ni akcentas, ni volas doni nur la eblecon por tia kunveno, absolute laŭ la deziroj de la gvidantoj de la koncerna organizaĵo.

Ni menciu, ke ni funkciigos Loĝigan Servon por certigi al la aliĝintoj kiel eble malmulte-kostan tamen konvenan loĝadon.

Verŝajne estos multaj, kiuj deziros pasigi ne nur unu semajnon en Hungario. Por kontentigi iliajn dezirojn, niaj aranĝaĵoj en julio estos sinsekvaj kaj kune formos la „Esperanto-Semajnoj en Hungario". La vicon komencos la X-a Jubilea Sesio de Somera Esperanto Universitato en la ĉarma urbeto Gyula, inter la 6—15-a de julio. Ĝin sekvos la Hungara Kultur-Festivalo, tuj post ĝia finiĝo oni povos viziti unu el inter la plej belaj montaraj regionoj de Hungario, ABALIGET en la montaro Mecsek kaj la urbon PÉCS. La V-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj (IREN) en Abaliget okazos inter la 24-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto.

Ni esperas, vi estas kontenta pri la enhavo de Hungara Vivo. Jen, ĉi okazon ni utiligos, doni al vi en la 1972-a jaro pli da literaturaĵoj ol ĝis nun. Hungara Vivo estas la oficiala organo de la Festivalo. Sur ĝiaj paĝoj ni informos vin pri ĉiuj ĉefaj sciindaĵoj. Ĉiuj aliĝintoj al la Festivalo ricevos senpage en la 1972-a jaro la kvar ekzemplerojn de Hungara Vivo. Se vi estas abonanto, ni esperas, ke vi aliĝos al la Festivalo, tamen, vi ne malmendos vian abonon, sed utiligos la duan ekzempleron por akiri pliajn abonantojn.

Kore ni invitas, partoprenu la Esperanto-Semajnojn en Hungario. Ni faros ĉion eblan por ke vi ĝuu senĝene la amikecon, gastamon de la hungaraj esperantistoj.

Béla Berceli
ĉefsekretario de HEA

PROVIZORA PROGRAMO

LUNDO, 17. 7. 1972.

Posttagmeze: — Solena inaŭguro
Vespere:
— Interkona vespero

MARDO, 18. 7. 1972.

Antaŭtagmeze:
— Vizito de bildekspozicio en la Belarta Muzeo
— Enketo por la verkistoj, ĵurnalistoj, artistoj partoprenantaj en la HKF: "Rolo de la esperantista artisto en la movado"

Posttagmeze:
— Malfermo de ekspozicioj kun gvidado:
— Folkloro
— Esperantistaj belartistoj
— Foto
— Literatura programo "Perloj de la hungara literaturo" (De la komenco ĝis 1945)

Vespere: — Liberaera koncerto

MERKREDO, 19. 7.

Antaŭtagmeze:
— Vizito al la Hungara Nacia Galerio kaj al la Parlamentejo

Prezentado: — Kantoj kaj ĥoroj

Posttagmeze:
— Literatura programo: "La nuntempa literaturo en la Hungara Vivo" (HV prezentas la nuntempan hungaran literaturon)

Vespere: — Filmprezentado

ĴAŬDO, 20. 7.

EKSKURSA TAGO
— Elekteblaj programoj: (aparte mendebla)
1. Vizito al Esztergom kaj Visegrád
2. Vojaĝo al Balatono
3. Vizito de hungara pejzaĝo: specifaj manĝaĵoj, ĉevalbredado kaj aliaj

VENDREDO, 21. 7.

Antaŭtagmeze:
— Vizito al la Historia Muzeo (Fortikaĵo de Buda)
— Ĉambromuzika matineo

Posttagmeze: — Teatra programo

Vespere: — Folklor- programo

Vespere, malfrue: — "Beat"-nokto por la junularo

SABATO, 22. 7.

Antaŭtagmeze: — Pupteatra prezentado

Posttagmeze: — Filmprezentado

Vespere: — Muzika vespero de Imre Ungar (Fortepiano)

DIMANĈO, 23. 7.

Antaŭtagmeze: — Ferma kunsido

Posttagmeze:
— Elekteblaj programoj:
— Ekskurso al la Esperanto-fonto
— Danuba promenado per ŝipo

Okazos laŭdezire kunvenoj de diversaj fakorganizaĵoj, por kiuj ni certigas lokon. Urborigardoj ĉiutage!

Ege mi amas aŭskulti lian parolon. Mi ĝuas lian modelan akcenton, admiras lian enviindan vorttrezoron, sed unuavice mi respektas lin pro lia logika pensmaniero kaj la juneca aktiveco, per kiu li agadas kiel gvidanto de nia Esperanto-mondmovado.

En la 56-a UK. oni reelektis prezidanto de UEA. lin, dr-on Ivo Lapenna, profesoron pri orienteŭropa kompara juro de la rajte mondfama „Londona Kolegio de Ekonomio kaj Politikaj Sciencoj". Pli frue li estis profesoro de internacia juro en la universitato de Zagrebo. En 1946 li agadis kiel eksperto pri internacia juro en la packonferenco de Parizo, kaj li funkciis kiel advokato de Albanio antaŭ la Internacia kortumo de Hago.

Li publikigis verkojn kaj studojn pri internacia kaj kompara juroj en la kroata, franca, angla, itala, germana kaj Esperanta lingvoj. Entute 12 verkojn (en formo de libroj) kaj ĉ. 150 studojn kaj artikolojn.

Lia nuna vizito en Hungario estas ligita precize al la studo de la nova ekonomia mekanismo en Hungario, kiu komenciĝis la unuan de januaro 1968 kaj troviĝas nun en la stadio de plena disvolviĝo. Kiel juristo li interesiĝas ĉefe pri la juraj aspektoj de la hungara ekonomia reformo. Sed li emfazas ke oni ne povas neglekti ankaŭ la ekonomian aspekton, sen kiu la juraj principoj ne estas studeblaj.

Li laboris ĉefe en la jura instituto de la „Hungara Akademio de Sciencoj" kaj de „Universitato de Budapesto". Tion li kompletigis per vizitoj al ŝtataj entreprenoj kaj kooperativoj kun la celo esplori la funkciadon de la nova mekanismo en la praktiko. Li diris, ke li gajnis tre favorajn spertojn.

Sed por ni unuavice, li estas la gvidanto de la E-movado, prezidanto de UEA. Mi demandis lin pri tiu lia funkcio. Jen pri tio lia koncepto:

1. Elirpunkto de ĉio estas, ke la lingva problemo de la mondo ak-

La prezidanto de nia mondmovado

riĝas ĉiam pli kaj ke la sola racia kaj radikala solvo estas Esperanto. Pri tio li estas tute konvinkita.

2. La vastaj amasoj kaj ankaŭ la kulturaj elitoj parte ne sentas la lingvan problemon, ĉar ili ne scias, ke ekzistas racia solvo, kaj parte, eĉ se ili scias iom pri Esperanto, ili ne fidas je ĝi, ĉar ili ofte havas falsan bildon pri la lingvo.

En tiaj kondiĉoj la taskoj de la organizita movado estas kaj grandaj laŭ amplekso, kaj multflankaj. Tio signifas, ke oni devas samtempe daŭre atentigadi kaj prezentadi ĉiujn forumojn, en kiuj la lingva demando manifestiĝas, kaj aliflanke prezentadi la Internacian Lingvon, kiel la solan eblan solvon, kiu kontentigas ĉiujn aspektojn de la lingva demando, nome la pure teknik-lingvan, politikan, ekonomian, sociologian, psikologian, eĉ juran.

Por tio necesas agi plurdirekte, ĉefe informadi en ĉiuj medioj ĝis la kulturaj kaj politikaj superoj (internacie, lande kaj loke), disvastigadi la lingvon per instruado sur ĉiuj niveloj, instigadi pluan krean laboron sur la kultura kampo (literaturo, teatro, filmoj, scienco, ktp.), kreadi kiel eble plej multajn servojn por praktika utiligado de la lingvo jam nun. Neniu el tiuj agadoj estas pli grava ol la aliaj, ĉar ili estas reciproke kunligitaj, apogas unu la alian, kaj nur en sia tuteco ebligas la progresigadon de la Internacia Lingvo. UEA kaj ĝiaj organizaĵoj estas absolute necesaj por la plenumado de tiuj taskoj.

Unu el la plej interesaj rimarkoj de la prezidanto estis, ke la rolo de la organizita Esperantomovado finiĝos tiam, kiam la nombro de personoj parolantaj la lingvon estos tiel granda, ke la afero ruliĝos per si mem, sen ia ajn organizita kaj planita laboro. En la sfero de lingva evoluo kaj samtempe konservado de la lingva unueco la ĉefan rolon ludos la Akademio de Esperanto, al kiu U. E. A. donas sian moralan kaj financan apogon. Ĝia rolo daŭre kreskas paralele kun la amasiĝado de la E-movado.

D-ro Lapenna parolis ankaŭ pri la malfacilaĵoj, kiujn prezidanto de asocio kiel U. E. A. necese frontas. Ilin kaŭzas ĉefe, ke ofte eĉ tre sindonaj kaj talentaj agantoj por Esperanto vidas nur unu flankon de la afero kaj komplete neglektas, aŭ eĉ ne vidas la aliajn. Plurfoje okazis kaj sendube okazos ankoraŭ, ke necesas pacience klarigadi eĉ bazajn laborprincipojn, harmoniigadi malsamajn opiniojn, kelkfoje eĉ kontraŭbataladi malseriozaĵojn por povi mobilizi la fortojn de la Asocio al difinitaj konkretaj taskoj.

Fine la prezidanto de U. E. A. emfazis la gravecon de la neŭtraleco de U. E. A. Ĝi havas, li diris, membrojn en landoj kun tre malsamaj politikaj sistemoj. La estraro de U. E. A., unuavice ĝia prezidanto, devas kompreni la politikan realaĵon kaj trovi konkretajn formulojn, kiuj pleje taŭgas por la konservo de la neŭtraleco en konkretaj okazoj. Tiu rolo de la prezidanto ne ĉiam estas simpla, aŭ facila, sed nur dank' al racia kaj justa aplikado de la principo de neŭtraleco, eĉ en periodoj de grandaj politikaj streĉitecoj estis eble por U. E. A. resti universala, nome havi membrojn en ĉiuj landoj kun malsamaj aŭ eĉ antagonismaj politikaj strukturoj.

La tasko de la Prezidanto estas: klopodi trovi en konkretaj okazoj la limojn de tio, kio estas akceptebla en la kadro de neŭtraleco de U. E. A. kaj kio transiras tiujn limojn. La tasko estas tre delikata kaj estas eble fari erarojn, sed li fidas, ke li ne faris en tia rilato kian ajn pli gravan eraron. En „konkretaj kazoj" oni devas klopodi resti neŭtrala, sed en gravaj aferoj ligitaj al la esenca rolo de Esperanto en la mondo, (ekz: paco kaj milito, homaj rajtoj ktp.) ni esperantistoj devas stari unuanime sur la flanko de homa progreso.

Dum la lasta kongreso en Londono d-ro Lapenna ricevis la aprobon de la plimulto de la Komitato de U. E. A. Li fidas, ke la granda plimulto de la membraro aprobas lian koncepton kaj starpunkton pri la rolo de U. E. A. en la nunaj kondiĉoj.

Ni gratulas al lia sukceso kaj deziras al li bonan sanon kaj multe da energio por la plua fruktodona agado kiel gvidanto de nia mondmovado.

Gábor Vigh

Lajos Galambos

MONO

La familio veturis supren inter la montojn.

Antaŭjare le kuracisto forkonsilis por la eta Andrea la lagobordon: la akvo-proksimo misefikis al ŝia gorĝo.

— Ĝis ŝia oka aŭ deka jaro mi proponas montregionon — li diris.

— Bone, estu do monto — kapbalancis Imre Etel —, al mi tute egale. Apud la du infanoj mi ripozos nek tiel, nek ĉi tiel.

Lia edzino murmuretis:

— Kiu al ni donos ja refreŝig-asignon kun niaj du infanoj? Kiu sindikato?

Neniu sindikato donis tian asignon. Laŭ la sindikatoj, nur infanoj pli aĝaj ol 14 jaroj estas rigardataj kiel homoj. La pli junaj iru en infan-refreŝigejon.

— Ni solvos la aferon private — diris Imre Etel al sia edzino. — Ni ne somerumos du semajnojn, nur ok tagojn. Por tiom da tempo sufiĉos nia mono, kaj tamen ni estados ie.

Por cent forintoj tage ili ricevis ĉambron ĉe privata domo. La posedanto, nomata Erik Számel, diris, ke tio estas tute normala prezo, temas ja pri kvar personoj. La cent forintoj rajtigis ilin je du litoj kun littolaĵo, tablo, seĝo, ŝranko kaj cindrujo, nenio plia. Nek lavakvo, nek viŝtuko.

Matene, je la kvina, la infaneto Andrea ekploris. La mastro tuj frapetis porde:

— Sinjoro — li diris —, en ĉi tiu domo la infano povas plori nur de la oka matene ĝis la deka vespere. Ĉiam alifoje la ploro kostas kvin forintojn.

— Mi komprenas — kapbalancis Imre Etel —, sed la infano petis pri nokta vazo. Ŝi aĝas, nome, nur du kaj duonon da jaroj, kaj ŝi pisas en noktan vazon, ne en la pelvon klozetan.

— Ni havas noktan vazon — diris Erik Számel. — Unu piso kostas unu forinton: ŝtata prezo. Sed ni povas kalkuli la prezon ankaŭ averaĝe: po ok forintoj tage. Ankaŭ kaketi la infano rajtos en la vazon.

— En ordo — kapbalancis ree Imre Etel. — Pardonon, ke ni ne kunportis noktvazon por mallonga refreŝiĝo.

— Sinjoro — ridetis Számel —, ĝi eĉ ne havus por si lokon en viaj maldikaj kofroj. Por ok tagoj oni ne bezonas kunporti la tutan domon, ĉiujn servaĵojn oni povas ja aĉeti loke.

Imre Etel iris al la ronda vendbudo por aĉeti kakaon kaj ĉiaspecan nutraĵon, sed li ricevis jam nur malvarman laktokakaon. Necesos varmigi ĉi tion, li pensis, kaj trafe. Li demandis la mastron:

— Kie mi povus varmigi ĉi tion?

— En la kuirejo, sinjoro, sur la gaso. Unu varmigo kostas unu forinton.

— Ĉu vi havus ian poton?

— Nepre jes. Ekzistas vazoj ĉiaspecaj. Ni estas komprenemaj kaj scias, ke la gasto ne povas kunporti ĉion. La uzo-prezo de ĉiu vazo estas unu forinto, post la uzado ĝi estas purlavenda.

— Kompreneble — kapbalancis ree Imre Etel.

— Trompi ne valoras la penon, oni tion tuj malkaŝas.

— Ĉiun trompon oni tuj malkaŝas — diris Imre Etel —, mi vere scias tion, mi laboras ja per komputeroj. Ĉu pri heleroj ni aĉumus tie ĉi? Por kio?

— Granda vero — metis Számel la manon sur lian ŝultron. — Mi vidas, ke kun vi ni interkompreniĝos. Kaj kvankam mi devus jam iri, mi estas ja laborulo, mi rakontos al vi mallonge unu kazon. Ni havis foje gaston; li ĉiam malfrue hejmenvenadis. Aŭ mi aŭ mia edzino devis resti maldorma, por kontroli, ĉu li ne baniĝas. Ĉar, ĉu ne, unu baniĝo kostas ses forintojn. Precize jam tiu persono sciis la prezojn. Li hejmenvenis kaj nenio, nenia akvoplaŭdado, ni enlitiĝis, kaj matene ni tamen trovis krispajn harojn en la bankuvo. Kiel tio povas esti? La morgaŭan, postmorgaŭan tagon ree ni trovis tiajn. Sendorme ni pasigis niajn noktojn; tage jam mia edzino kaj mi iradis kvazaŭ trapafitaj lupoj. Mi gvatos lin, mi pensis, foje jam necesas lin gvati. Li hejmenvenis. Mi ŝtelis min singarde al la banĉambro, oni ja ne konstruas el nenio tian belan villon, ne aĉetas el nenio aŭton! — imagu, kion kapablis fari tiu persono! Pardonu pro la sincereco, li faligis elŝiritajn brustharojn en la puran bankuvon! Por ke ni postulu la ban-prezon kaj li povu protesti. Eĉ, eble, nin denunci! Jen, sinjoro, kiaj homoj ekzistas. Timige!

— Timige — diris Imre Etel. — Ni ne estas tiaj.

— Mi vidas tion sur via pia vizaĝo.

— Se ni baniĝas, ni baniĝas, se ni ne baniĝas, ni ne baniĝas.

— Jen la neta parolo, sinjoro.

Elvenis la edzino de la mastro kaj frapetis la edzon je la kolo:

— Jam delonge vi devus esti foririnta.

— Tiel bone ni konversaciis kun la sinjoro.

— Ekiru! — kriis la granda peco da virino. Ŝia rigardo ekfulmetis kiel klingo ĉe ĉiu ŝia movo. — Li kapablas forklaĉi la tempon. Kaj nun li pelegos la aŭton, por veni en la fabrikon ĝustatempe. Kia malŝparo! Kaj jen! Li ne fermis la pordegon! Envenas ia fremda besto kaj paŝtiĝas sur nia korto aŭ ekskrementas tien: kvin forintoj da damaĝo, mini-

mume. — Ŝi fermis la pordegon, revenis. — Kiam vi ekiros? — Ŝi demandis. — Aŭ vi restos hejme la tutan tagon?

— Post matenmanĝo ni iros sur la montojn.

— Ĉar vi povas vin distri ankaŭ ĉi tie. Ekzistas tenistablo, pilkoj, rakedoj, unu horo kostas kvin forintojn. Ekzistas plumita pilko, loko por ĝi estas sufiĉa en la korto; unu horo kostas nur tri forintojn. Se mankas partnero, jen miaj du filoj. Seto perdita: kvin forintoj.

— Ni iras sur la montojn — diris Imre Etel.

— Mi bedaŭras — paŭtis la virino.

Granda jam estis la somero. La edzino kaj la adoleska knabo facile eltenis la turistajn vojojn, sed sur la kolo de Imre Etel sidis la infaneto Andrea.

— Ĉu vi ne portus kelktempe vian fratinon? — demandis Imre sian filon.

— Kion vi donos por tio?

— Jam ankaŭ vi?

— Mi aŭdis matene vian interkvakon — diris la knabo.

— Nu, kaj?

— Mi timas, ke foje la mono aperos ankaŭ ĉe ni kaj volas kun vi paroli.

Imre Etel rigardis sian filon, la 16-jaran junan Imre. La edzino Magda kaj li kuntrafis tiutempe, kiam li estis praktikprovanto ĉe la poŝto. Magda estis tute juna, tuj post la matur-ekzameno ili geedziĝis, poste ŝi, en sia 19-a jaro, naskis ĉi tiun grandan nunan bubon. Andrea venis tre malfrue, preskaŭ post 13 jaroj. Dume iliaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis: ili havas belan loĝejon, Magda estas grupestrino kaj li estas esplor-inĝeniero en la instituto de la poŝto.

— Ej — li diris al sia filo —, pri kio povus paroli kun mi la mono?

— Pri aŭto, semajnfina domo, vestoj, okcidentaj vojaĝoj.

— Kun du infanoj sur miaj ŝultroj, kaj kun gepatroj, kaj kun amortizaj pagoj por la loĝejo. Vi ne konas min, filo.

— En la lernejo, dum la ekonomikaj horoj ni parolas pri nenio alia, ol ke en nia socio nomata revolucia validiĝas neniu alia kategorio krom la mono.

— Vi estas stultaj por la vivo, filo.

— Sed ne blindaj, patro.

Magda returnis sin:

— Pri kio vi parolas?

— Ho, ke tian admirindan someron mi ĝuis eble antaŭ dek kvin jaroj — diris Imre Etel. Tiam mi estis soldato kaj la juna Imre estis survoje al la mondo. Iun vesperon ni revenis malfrue en la kazernon el la ekzercejo. Tiuvespere, post vespermanĝo, sub la tilioj antaŭ la komandejo ni sentis, ke niajn pulmojn disstreĉas la neesprimeble bona aero somera. La naturo povas esti tiel malavara nur en sia ludema humoro. Kiel ankaŭ nun.

— Frenezeta — diris la edzino.

Ĉirkaŭ la dekunua ili atingis fonton kaj tie la infanoj trinkis akvon de fabelo. Poste ili kuŝadis sur la sun-trafata flanko de la monto. Florodoro ilin ĉirkaŭsvebis, abeloj ludadis ĉirkaŭ ili, ventumetis iliajn palpebrojn per la flugiletoj.

— Kaj troviĝas ankoraŭ tiaj — diris la bubo —, kiuj degnas veni ĉi tien per aŭto.

— Lasu ilin, ankaŭ ili estas homoj.

— Kiaspecaj?

— Eble ĝuste tiaj kiel mi. Ili amas la infanojn, amas sian familion, amas la laboron.

— Kaj la vinon — diris Magda ridante. — Kiel vi. Imre Etel surkubutiĝis.

— Nu kaj kio? Ĉu unu aŭ du glasoj da vino tage ne estas objektiva kategorio?

Li puŝis kubute sian filon. La juna Imre akceptis la defion kaj ili baldaŭ laŭtkrie knedis unu la alian, kun radfaraj saltoj transkapiĝadis ĝis la rando de ravino. Magda kaj bebo Andrea terurite postkuris ilin.

— Frenezuloj!

Poste ili manĝis kaj trinkis font-akvon.

Hejmenire, dum Magda kolektis montajn florojn kaj Andrea tronis sur la kolo de la juna Imre, la bubo diris al sia patro:

— Iun vesperon ni surkraĉadis aŭton; la polico jam serĉadas la kulpintojn. Ni estis sepope, tiuvespere, kiam mi diris al vi, ke ni iros al kinejo en la aranĝo de KJF. Tio estis ja vera, sed dume ni ekvidis grandan, longetenditan imperialistan aŭtomobilon. Ni iradis ĉirkaŭ ĝi ronde kaj ĝin surkraĉadis. Precize dum du horoj ni kraĉadis, dum la kino-prezentado daŭris. La ulo povis ĝin lavi matene. La lavigo kostis al li unu centforintan, minimume.

— Ĉu vi ĝojis pri tio?

— Ni faris ion.

— Ĉu ion revolucian?

— Jes.

— Kiel via kokida cerbo imagas la revolucion.

— Jes ja, ni ĉikanis burĝon.

— Burĝon? Granda dio! Kiama nocio estas ĉi tio?

— Vi instruis tion. Kaj mi eĉ pensis, ke vi, se vi ĉeestus, aliĝintus al nia rondo.

Imre Etel silentis. Poste li diris.

— Transdonu Andrean, mi portos ŝin plu. Kaj vi helpu vian patrinon kolekti florojn.

Ĉe sunsubiro ili hejmenvenis. Nu, kompreneble ili ree sentis malsaton, precipe la infanoj.

— Ĉu ni povus rosti lardon sur rostostango? — demandis Imre Etel Erikedzan Számel. — La familio ĝin amas.

— Nepre. Ni havas lardorostan lokon ĉirkaŭmetitan per ŝtono, ĉirkaŭatan de malaltaj ŝtonbenkoj post la domo. Ni havas ankaŭ lignon. Ankaŭ ekbruligilon. Po kvin forintoj por persono. Kaj ĉar vi estas kvarope . . .

— Kvarope . . .

— Mi povas vin servi ankaŭ per lardo, pano, cepo.

— Ne, tiujn aĉetos mi mem.

— Tiam, kiel ĝis nun, ĉu mi povus peti la monon antaŭe?

— Certe.

Eble Imre Etel akceptus la servojn de la mastrino, se li ne volus aĉeti ankaŭ botelon da vineto. Sed li volis.

Pri la lardorosto ili sukcesis prince. Tie flankumis ankaŭ la infanoj de la mastro, sed Imre Etel ilin eĉ

ne alrigardis. Nur la bebo Andrea proponis al ili kelke da lardohaŭtoj.

Poste ili kantis, la bebo Andrea vaste malfermis la gorĝeton:

vesperhore, malfruhore
paŝtistfajroj brulas fore . . .

Ili kuŝiĝis kun la feliĉa laco de la tago. Sur la du litoj, patro kun filo, patrino kun filino. Sed estis egale. Ili povis ripozi. Ĉar ĉu al ili ne donis ĉion tiu tago?

Foje iu frapetis porde. Kiel kutime en la familio, Imre Etel vekiĝis la unua.

— Kiu estas?

— Mi vin petas, sinjoro Etel.

— Ĉu sinjorino Számel?

— Kiu alia mi estus. Se vi elvenus por momento.

— Kioma horo?

— Tuj noktmezo.

— Ĉu mi ne pagis por io?

— Temas pri io tute alia, mi petas.

— Nu? — eliris Imre dormeme, en piĵamo.

— Mia edzo ankoraŭ ne venis hejmen.

— Ej — gestis Imre —, konferenco, ktp. ekzistas tiaĵoj.

— Neniam tiaĵo okazis ankoraŭ.

— Voku telefone lian labor-lokon.

— Ve, de kiam ni bojegas al la poŝto — ŝi diris fajrerante —, ke ĝi instalu por ni telefonon. Ĉu ĝi instalis? Peston! Kaj tuj estos noktmeze. Kaj kiel mi iru nun al la poŝto? Kiun mi sendu? Kaj vi estas ja poŝtisto.

— Ĉu mi? Nu jes, mi laboras ja ĉe la poŝto.

— Se vi farus tion. Oni deĵoras tie tutnokte. Sed kiu tien povas eniri? Nur vi.

— Kie laboras via edzo?

— Konstrubriko, material-provizo. Jen la telefon-numero.

— Atendu — diris Imre Etel. — Mi vestos min.

— Kien vi iros? — suspiris lia edzino en la lito. — Ĉu drinki?

— Vi sonĝas — diris Imre Etel.

Li eliris al sinjorino Számel.

— Ĉu mi do iru?

— Mi vin petas. La poŝto estas proksimume duonkilometron for, en la dua flankstrato dekstre.

— En ordo. Mi petas ducent forintojn.

— Por kio? — haltis la rigardo de la virino.

— Cent forintoj por la tien-iro, unu por la eliro, unu por la reveno. Ĉu ne tiel estas?

— Sed jes. Ni deprenos la sumon el la ĉambroprezo.

— Ne, sinjorino — diris Imre Etel. — Antaŭe, kiel pagas mi. Se vi trovas la sumon troa, mi ne iros. Sed jam tio, ke vi min vekis, kostas dudek forintojn.

Erikedza Számel pale transdonis la monon kaj ellasis Imre-n tra la prodego. Kaj tie ŝi atendegis, ĝis la viro, post larĝa duonhoro, revenis.

— Nu? — ŝi demandis laŭtspire.

— Antaŭ ĉio, jen estas la telefon-fakturo.

— Kio al Erik?

— Ankoraŭ matene li iris al la Peŝta magazeno de la Konstrubriko.

— Per nia propra ĉaro?

— Per tiu.

— Kaj li ne preterveturis ĉi tie? Li eĉ ne vortis, ke li iros?

— Ne.

— Kial? Je la amo de Dio?

— Li tion ne diris.

En la vizaĝo de Számel-edza jam troviĝis neniom da sango:

— Se mi vin petus, ĉu vi telefonus al Budapeŝto?

— Kial ne? Se mi jam sidas ĝiskole en la afero . . .

— Mi havas la numeron de la centra magazeno. Oni deĵoras tie nokte. Ĉu vi farus tion?

Imre Etel malfermis la okulojn:

— Mi petas tricent du forintojn.

— Sed pro kio?

— Tial, ke mi reiros. Sed se mi ne iros, ankaŭ tiam kostas kvindek forintojn, ke vi rabis unu horon el mia nokta ripozo. Se vi ne konsentas, iru mem.

— Ve — diris Számel-edza. Kaj ŝi pagis.

— Ĉio ĉi estas krom la telefon-fakturo. Tion ni ne forgesu.

Dirinte ĉi tion, Imre foriris kaj revenis tagiĝe. Számel-edza sidis en la kuirejo.

— Nenio malbona — rakontis Imre. — Vian edzon la polico reekspedis en la gastodomon de la Konstrubriko. Ili drinkis iom. Sed nenio katastrofa. Ili ne faris tro grandan skandalon. Vespere sinjoro Számel jam estos hejme. Jen la telefon-kvitanco, bonvolu ĝin transpreni.

Poste Imre Etel kuŝiĝis.

Sekvatage, ekskursinte sur la montojn, ili ree venis vespere hejmen. Ili aŭdis, ke Számel-edza batas sian edzon:

— Vi ŝtelis dehejme unu milforintan. Por kio vi ĝin elspezis? Mi elpagis pro vi kvarcent forintojn, se ne paroli pri la telefon-fakturoj. Fripono, kion ankoraŭ mi faru pri vi?

— Batu min, virino, batu!

La familio Etel iris al la rivereto, por vespera trutkaptado.

— Ĉu vi tondis de ili lanon? — demandis la filo de Etel.

— Mi hontas pri tio — respondis la patro. — Ĝis nun mi rigardis min pura. Mi dezirus resti pura.

Tr.: K. Kalocsay

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!

GASTA PAĜO

William AULD sendube estas la plej grava Esperanta poeto de la postmilita periodo. La apero de la volumo *Kvaropo* — en kiu li debutis — estis mejloŝtono por nia literaturo. Lia ĉefa verko estas la grandioza *La infana raso*, kiu estas eble la plej valora libro en nia tuta originala literaturo. Kvankam malpli konata, ankaŭ la poemaro *Unufingraj melodioj* (kiu cetere ĉerpas la titolon el poemo de Ernő SZÉP) enhavas serion da bonegaj lirikaĵoj.

En la lasta tempo li ŝajne verkas pli aktive: krom la ĵus aperinta nova poemaro[1] ni ŝuldas al lia plumo la bonegan progresigan lernolibron *Paŝoj al plena posedo.* Cetere ĉi lasta kaj la dua eldono de *La infana raso* rikoltis maloftan, sed plene merititan furoran sukceson ankaŭ en la libromerkato. Kiel ĉefredaktoro de *Norda Prismo*, li okupas jam de kelkaj jaroj unu el la plej gravaj postenoj de nia kultura vivo.

La nova poemaro — *Humoroj* — avertas jam per sia titolo, ke la poeto liveras al ni ion novan: post la kosme vasta, sinteziga liriko de *La infana raso* li turnas sin al la analizo de la intima mondo de la individuo. La poemoj de la nova volumo plene konservas la ĉefajn virtojn de lia poezio, eĉ, ilia strikte persona karaktero faras ĝin pli varma, pli sincertona, tamen estas problemo decidota, ĉu el tiu temŝanĝo rezultis progreso kompare al la pli frua produkto.

Ni prezentas kelkajn pecojn el la nova poemlibro.

Vilmos Benczik

GEEDZOJ

Li vendis sin por kruropar',
jarteloj kaj artsilkaj ŝtrumpoj,
du mamoj pintaj, kapharar':
kaj baldaŭ trovis ilin plumpoj.

Ŝi siaflanke vendis sin
por virposedo, dom' sekura,
kaj la titolo "Sinjorin":
ŝin ĝenis ludo interkrura.

Unuinfana famili',
kunvivis iel-tiel ili,
plejparte sen konversaci':
ja mankis tem' por pribabili.

Ŝi mortis, aĝa sesdek-du,
post tia anonima vivo.
Li ekkonsciis pri vaku'
kaj manko de ekzistmotivo.

Ĉe la filino kaj bofil'
sian loĝlokon li establis —
pli bona ol paroĥ-azil'
(ili nek grumblis, nek afablis).

Kaj dum fridiĝis lia sang',
foje, en sol' melankolia,
larmo ruliĝis laŭ la vang',
kaj flustris lia kor': Maria!

BONAN MATENON, MAJSTRO

Bonan matenon, Majstro! Sidiĝu, mi petas.
Kiel vi fartas post kvindekjara malvivo?
Bonvolu fumi. Nu, vi certe enketas
pri la Movado, kaj l' nuna perspektivo?
Nu, ni laboras. Sed — vi scias — la homoj
estas inertaj, altaj estas la baroj,
malfavoras l' epoko; militoj, pogromoj
minacas; nin ignoras la registaroj.
Jes, jes, en via tempo, estis simile;
vi tamen ne povas kompreni, kio nin frontas —
atingi l' orelojn estas malfacile,
kaj kiam la homoj mokas nin, ni hontas.
Nu jes, vi multe oferis. Ni mem kelkfoje
donacis kelkan monon, sed ni malriĉas.

Ne pensu, ke ni nenion faradas survoje!
Al ata-ita ni multe da tempo dediĉas!
Mi diris, ke per ignoro stulte obstina
la registaroj aŭskulti nin rifuzas?
Eĉ pli malbone — la registaro ĉina
por siaj propraj celoj la lingvon *uzas!*
Ni lernis la lingvon, kaj kiam ajn ni kunvenas,
ni krokodilas... Kio? Ja nacilingve
babili... Ĉar komencanto ne komprenas,
kiam ni Esperanton parolas svinge.
Nu, Majstro, estis agrable... Ĝis la revido;
ĝojos pro via vizit' la samideanoj.
vi povas reiri la tombon kun forta fido,
ke via afero troviĝas en bonaj manoj.

REĜO LEAR

Hamlet', Otelo, Kleopatra — kreas
Ŝekspiro epitomojn de la raso;
unu post unu ili apogeas,
kaj homon dignovestas el amaso.
Kaj tamen dum ni kontente aventuras
en la verkaro de l' dramist' genia,
subite, mikrokosme, nin konturas
plej animskue la moment' mania,
kiam figuras, laŭ natura leĝo,
la homan rason jen triopo juĝa:
folul' sentenca; kaj freneza reĝo;
kaj bona hom' frenezŝajnige fuĝa.

NOKTOMEZE

Trankviliĝu, mia karno.
Ĉu vi ne scias,
ke la Nirvano, kiun vi sopiras
estas neatingebla?

Kial vi persistas
ĉasi iluziojn?
Do ŝi estas bela.
Do vi amas ŝin. Bone.

Pro tio vi ĝinon glutas?
Ĉu vi supozas
ke alkoholo
solvos vian problemon?

Venos la morgaŭo
kaj same tiel senespere
vi ŝin sopiros.
Krom tio vin turmentos
postebrio.

Stultulo, kontentiĝu.
Vi rajtas rigardi ŝiajn belojn
kaj fantazii.

---

1. *William AULD: Humoroj (Poemaro). Enkonduko de Henri Vatré. Stafeto. Beletraj Kajeroj 39. La Laguna, 1969.*

La inventaĵvenda entrepreno *Licencia* prezentis en Londono, antaŭ ĉ. 200 fakuloj de la plej signifaj liftfabrikoj de la mondo, la modelon de la inventaĵo de hungaraj inventistoj *István Bálint* kaj *Sándor Baumann*. Ĝi estas liftinstalaĵo kun elektronika grupa komandado, gajninta grandan ormedalon en la lasta Brusela mondekspozicio.

La Internacia Konstruo-Esplora Konsilio, unuiganta ĉiujn konsiderindajn konstru-industriajn esplor-institutojn de la mondo, tenis sian V.-an kongreson en Versailles. Tie la unuan fojon oni elektis por la konsilio prezidanton, kiu reprezentas socialisman ŝtaton, nome dron Gyula Sebestyén, direktoron de la hungara Konstruo-Scienca Instituto. En la kongreso oni tenis 170 prelegojn; dek tri el ili estis de hungaraj fakuloj.

La malnova hungara arto, de kiam oni ĝin prezentis en Neuchatel, en 1965, konkeras novajn Eŭropajn ĉefurbojn. Post Parizo, Londono, Beogrado kaj Bruselo, en 1971 en la famaj salonoj de la Palazzo Venezia en Romo oni ekpoziciis la plej belajn pentraĵojn, statuojn, alajn altarojn, oraĵist-objektojn, ceramikaĵojn, teksaĵojn, kodeksojn el la epoko ekde la patruj-konkero (896) ĝis la 18-a jarcento.

La Internacia Vit- kaj Vinkultura Oficejo konfidis al Hungario — unu el siaj plej malnovaj fondintaj membroj — la organizon de la unua monda vin-konkurso. En 1972 okazos en Budapeŝto la konkurso de 1200 vino-specoj, je kiu oni atendas anonciĝojn el ĉiuj konsiderindaj vinproduktaj landoj de la mondo, el preskaŭ 30 ŝtatoj. Por la turistoj alvenontaj al la ekspozicio oni pretigas la vin-mapon de Hungario, montrante sur ĝi niajn plej famajn vinberproduktajn regionojn.



La "Wiener Sezession", unu el la plej malnovaj Eŭropaj art-asocioj, fondita en 1897, elektis inter siajn anojn la junan hungaran pentrartiston *Kornél Haynal* pli j., kiu nun finas siajn studojn en la Viena Belarta Akademio. La "Wiener Sezession" ĉi-jare elektis du novajn membrojn: la mondfaman anglan artiston *Henry Moore* kaj la junan hungaron.

En Parizo, proksime al la Triumfarko, la rekonstruita Hotelo Metropol akceptas ekde julio hungarajn gastojn. La enirejon kaj la halon de la hotelo oni ornamis per hungareskaj motivoj kaj suveniroj (memor-objektoj), tiel ke oni povas nomi la hotelon hungara hotelo de Parizo. La entrepreno Coopturist ĝin luas por la alvojaĝantaj hungaraj eksportaj-importaj komercistoj kaj por oficistoj de ministerio de aferoj eksterlandaj. Por plifaciligi la komercajn intertraktojn, oni instalis en la hotelo intertraktan ĉambron kaj muntis teleksojn, por ke komercistoj de eksteraj negocoj povu facile komunikiĝi kun sia Budapeŝta centro. Se la Pariza provo estos sukcesa, povas okazi, ke Coopturist estigos tian "hungaran" hotelon ankaŭ en aliaj Eŭropaj grandurboj.

Iván Boldizsár, prezidanton de la Hungara Pen-Klubo kaj ĉefredaktoron de *New Hungarian Quaterly*, unu el la universitatoj de Usono, la *Union College* en *Shenectady*, akceptis kiel honoran doktoron kaj elektis honora rektoro de la universitato. Kiel tia, Boldizsár faris la jar-ferman paroladon en la universitato; pri tio la gazeto *New York Times* raportis en aparta artikolo.

En Budapeŝto kunsidis grupo da demografiaj fakuloj de ONU. Tie oni anoncis, ke 1974 estos jaro de mondpopolumo; per ĝi oni volas veki atenton pri la demografiaj streĉoj kaj kontraŭdiroj, tiom influantaj la futuron de la homaro. Por 1974 popolum-politikaj programoj kaj esplorlaboroj estas preparataj. Unu ĉenero de la prepariĝo estis la Budapeŝta konferenco, kie naskiĝis multaj proponoj.

En la ĉi-jara filmfestivalo en Cannes la filmo *Peranto de* la angla filmreĝisoro *Joseph Losey* ricevis la grandan premion. La filmo *Amo* de la hungaraj reĝisoro *Károly Makk* kaj verkisto *Tibor Déry* gajnis la premion de la ĵurio. La ĉefajn rolulinojn de la filmo, *Lili Darvas* kaj *Mari Törőcsik*, oni distingis per aparta laŭdo. La filmo krome gajnis la premion de la internacia katolika filmarta asocio.

La kanto-ĥoro de BBC prezentis grandsukcesan Bartók-koncerton sub la gvido de Cecilia Vajda en la Londona Queen Elisabeth Hall. La dirigentino nun en la Kimruja urbo Swabsea gvidas la Kodály-centron, fonditan de ŝi mem.

Antaŭ cent jaroj aperis la unua hungara poŝtmarko. Okaze de tio, en septembro ĉi-jara oni aranĝis en Budapeŝto *mondekspozicion de poŝtmarkoj* sub la patroneco de F. I. P. Filatelistoj de pli ol 40 landoj, en 3800 kadroj, ekspoziciis 44 000 albumojn da poŝtmarkoj, inter ili multajn mond-rarajojn. Unu el la sensacioj de la ekspozicio estis kelkaj fabele valoraj poŝtmark-rarajoj de la angla reĝino Elisabeth II. El ŝia kolekto valoranta du milionojn da pundoj, kiu estas preskaŭ certe la plej valora poŝtmarko-kolekto de la mondo, "gast-rolis" pluraj raraj unupencaj nigraj kaj dupencaj bluaj poŝtmarkoj, krome kelkaj belaj ekzempleroj de britaj Okcident-Indiaj (Karibaj) poŝtmarkoj.

Inter la hungaraj belartaj ekspozicioj, aranĝitaj ĉijare en eksterlando, la plej signifa estis la "Hungara arto de mil jaroj", aranĝita en la Puŝkin-muzeo en Moskvo kaj poste en la Leningrada Ermitaĝo. La loĝantoj de Berlino, poste de Prago kaj Bratislavo povis ekkoni la arton de Gyula Derkovits en reprezenta, kolekta ekspozicio. En la Venecia grandskala internacia ekspozicio de grafikaĵoj "Eŭropa Grafiko" estis videblaj ankaŭ la artaĵoj de la hungaraj Ferenc Czinke, Károly Jurida, János Kass kaj Gábor Pásztor.

Sur la ĉi-paĝa bildo estas videbla la katedralo de PÉCS, plej signifa el la transdanubiaj (Panoniaj) urboj hungaraj. La katedralo origine pretiĝis en la 11-a jarcento, sed plurfoje pereis kaj rekreiĝis; sian originalan romanikan formon ĝi rehavas ekde 1890. PÉCS estas tre malnova urbo, jam tempe de la romianoj ĝi estis guberniestrejo, nomata *Sopianae*. El la kristan-romiana tempo devenas ĝiaj *katakomboj*. Belege ĝi situas sur la deklivoj de la montaro MECSEK. El E-a vidpunkto estas notinde, ke en Pécs okazis la TEJO-kongreso en 1966. La e-ista vivo estas vigla kaj modele organizita. Ĝi havos sian rolon ankaŭ en la Kultur-Festivalo somere de 1972.

KARAJ LEGANTOJ

Ree ni finos unu jaron, vivu lasekvanta!

Okaze de la jaroturno kaj la jarfinaj festoj: la amfesto KRISTNASKO kaj la NOVJARA FESTO antaŭata de la gaja, iom eĉ dibocema SILVESTRONOKTO, ni deziras al ĉiuj niaj abonantoj kaj legantoj multajn agrablajojn kaj amuzajojn, la belan ĝojon de donacanto kaj donacato dum la festoj kaj ankaŭ tion, ke la bona sento de tiuj festoj, tute aŭ grandparte, persistu en la tuta nova jaro.

La esperantistoj, laŭ la malnova zamenhofa tradicio, ankoraŭ konservata en „La Espero", esperas, ke „la homoj faros en konsento unu grandan rondon familian". Provizore tro multe mankas por la realiĝo de tiu espero: la hombuĉado plurloke apartenas ankoraŭ al la aferoj de la ĉiutaga praktiko. Neagrable estas memori pri tio, preparante nin por la festoj, sed, ne memorante pri tio, ni ne meritus la festojn.

En tiu espero do ni nun, rezignacie, devas esti multe pli modestaj provizore. Ni deziras, ke — se ne la tuta esperantistaro — almenaŭ niaj legantoj faru kun niaj redaktantoj tiun „rondon familian", sentante apartenecon al la revuo, skribante al ni siajn rimarkojn, plaĉon aŭ malplaĉon, proponojn kaj dezirojn. Fidante, ke vi tion faros diligente, ni deziras ree al vi ĉiuj
feliĉan, riĉan, fekundan, ĝojabundan

NOVAN JARON

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

I B U S Z

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotelĉambro-rezervado
Aranĝo de pasport- kaj enirvizo-afero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ŝipo kaj trajno
Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en vojaĝaferoj

Oficiala vojaĝagentejo de la Mondekspozicio de Ĉasado

IBUSZ-AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LANDO

REPREZENTEJOJ:

ĉe limstaciejoj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj eksterlande

Amsterdamo	Londono	Romo
Berlino	Moskvo	Sao Paulo
Bruselo	Otavo	Stokholmo
Frankfurto	Parizo	Vieno
Kolonjo	Prago	

KOLOROJ

Laŭ enciklopedia determino: la koloro estas percepto sur la iriso, kiun estigas diversaj elementoj de la lumradio, resenditaj de iu korpo.

Ĉar la koloro esence estas lumo, estas tute kompreneble, ke ĝi apartenas al la kampo de fiziko. Ankaŭ tio estas ĝenerale konata, ke la koloroj havis ĉiam gravan signifon en la belartoj, precipe en la pentroarto. Rememoru ekzemple, ke Leonardo da Vinci obsedite esploris la sekreton de la farboj. Sed al la vasta publiko estas malpli sciate kaj iom surprize, ke la kolorproblemo ofte ludis pli gravan rolon en la filozofio ol en la estetiko. Multaj famaj filozofoj — Platon, Galilei, Descartes, Bergson ktp. — meditis pri la filozofia dilemo: ĉu la koloro, kiun ni vidas, estas objektiva eco de la mondo, de la materio, aŭ nur luda iluzio de la sens-organo? Laŭ la antikva legendo, Demokrito blindigis sin, por ke la percepta okulvido ne nebuligu lian spiritan akrevidon. Rilate al la kolorsistemigo, la adeptoj de la trikolora teorio (ruĝa-verda-blua) kaj kvarkolora teorio (ruĝa-flava-verda-blua) ankaŭ hodiaŭ militas inter si.

En la moderna epoko, aparta sciencbranĉo, la kolordinamiko intense analizas la efikojn, kiujn la koloroj estigas en la homoj, eĉ en la bestoj. La observaĵojn de la fakuloj oni utiligas en multaj terenoj de la ĉiutaga vivo. Rigardu kelkajn el ili:

En la medicin-scienco — ĉefe en la psikiatrio — sukcese oni aplikas la kolorterapion, ĉar pruviĝis, ke la koloroj mobilizas la homan sentomondon kaj kapablas biologie influi la organismon: plialtigi la tension, rapidigi la spiradon, malpliigi la ekscitecon ktp. En la nervosanatorioj oni lokas la malsanulojn en blu-murajn aŭ ruĝ-murajn ĉambrojn, laŭ tio, ĉu tiuj furiozas aŭ melankolias, ĉar la varmega ruĝa koloro havas efikon stimulan, male al la malvarma bluo, kiu kvietigas, trankviligas. Malkaŝiĝis ankaŭ tio, ke la cerbmalsanuloj kaj krimuloj forte inklinas al la malpuraj, konfuzaj koloroj, dum la viglaj nuancoj ilin ŝokas. Diversaj eksperimentoj montris, ke la okroflavo ĉe stomakmalsanuloj, la rozkoloro ĉe kormalsanuloj vekas malbonan farton. Same medicina afero — kvankam ne malsano, nur anomalio — estas la daltonismo. La kolor-eraruloj ne kapablas distingi inter la ruĝa kaj verda, kelkfoje inter la blua kaj flava koloroj. Estas interese, ke ĉi tiu malnormaleco estas multe pli ofta ĉe viroj ol ĉe virinoj. (Tamen, el tio ne sekvas, ke la edzo estas nepre „kolorblindulo", se li preteratentas la freŝe orblondigitan frizaĵon de la edzino; ties kaŭzon oni serĉu en io alia).

Ankaŭ en la labor-scienco la kolorefiko ne estas bagatela. Estas pli ol estetika demando, kiakoloraj oni farbis la maŝinojn, instalaĵojn, la murojn de la uzino. Per konvena farbado oni povas pliagrabligi la laborejan medion. Ekzemple la oranĝa koloro pliigas, la verda mildigas la bruo-senton. Krome, la verda ripozigas la okulojn. La "bruaj" koloroj pliigas la muskolstreĉon. Ĉe flava koloro la acida odoro efikas pli akra. Laŭ ĝenerala sperto, alvoki la atenton al danĝero, veki singardemon plej taŭgas kiel avertilo striitaj kolorkombinoj nigraj-blankaj aŭ nigraj-flavaj.

Bedaŭrinde, en la trafiko oni tute neglektas la kolordinamikon. La statistikoj pruvas, ke la plej multa okcidento trafas la grizajn kaj sablokolorajn veturilojn, kiuj kvazaŭ kunfandiĝas kun la ŝoseo. La plej favora el tiu vidpunkto estas la blanka koloro de la aŭto. Kompreneble ankaŭ tiu bonŝanco tuj ĉesus, se ĉiuj estus tiel koloritaj, ĉar sur la vojo estiĝus laciga monotoneco.

La vulgara popolo same sentas la potencon de koloroj kaj sendepende de la scienco ankaŭ ĝi esploras ties efikojn kaj klopodas fruktuzi la spertojn. La loĝantaro de la varmega zono malkovris, ke la nigra englutas, la blanka reĵetas multon el la lumo, do ili vestas sin plej taŭge per blanko. La vilaĝanoj priatentis, ke la flavaj koloroj kvazaŭ magnete altiras la vespojn, male al ia nuanco de bluo, kiun — ĉefe la muŝoj — zorge evitas, ĉar tiu tre "nervozigas" ilin. Kelkfoje estas videblaj blukoloritaj pordo-kaj fenestrokradoj, kies farbo servas per fortimigo de la insektoj.

La koloroj havas rolon ankaŭ en la simboliko. Pensu nur ekzemple pri la flave velkanta foliaro, aŭ pri la griza hararo. Ambaŭ heroldas pri la aŭtuno. Kaj la multesciaj koloroj kapablas eĉ paroli, paroli per lingvo de simbolo. La iamaj inkaoj anstataŭ literoj uzis la tiel nomatan nodo-skribaĵon kaj sendis mesaĝojn per diverskoloraj fadenoj. La flava reprezentis oron, la blanka arĝenton, la verda grenon, la ruĝa soldaton ktp. La simbola rolo de koloroj — kiun akceptas ankaŭ hodiaŭa homo — estiĝis kaj formiĝis dum longaj jarcentoj. En la simboloj esprimiĝas nacia, religia, kultura, socia memorajoj. Tiel fariĝis la nigra, ruĝa aŭ blanka la koloro de la funebro. La ĉastecon, purecon signas la blanka. Ruĝa estas esprimo de amo kaj revolucio. La flavan koloron oni parigas kun la envio. En Azio ĝi signas epidemion. La felicon portas rozkolorajn okulvitrojn. La purpuro apartenas al reĝoj, cezaroj. Violkoloro konfesas pri pento. La bluo anoncas la ideon de mondpaco. La osceda enuo enkorpiĝas en grizo. Pri intrigo denuncas la bruno. La verdo simbolas esperon, simbolas nian lingvon, Esperanton.

La miltona kolorregiono estas plena de sekreto, mistiko. La moderna kemia industrio alsorĉas pli kaj pli novajn nuancojn, kaj en tiu kolororgio la homo ĉiam malpli povas sin orienti. Per devizo de "bunta modo" oni ofte faras atencon kontraŭ la harmonio, kontraŭ si mem.

Milda, sovaĝa, arda, pala, kruda, delikata, ofenda, gaja koloroj, vi mirindaj! Kiel malriĉa estus sen vi la mondo!

Ada Csiszár

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO POR PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO

BUDAPEST, V., JOZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128.
TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY

BUDAPEST V., JÓZSEF NÁNDOR TER 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5.
CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE

BUDAPEST V. JÓZSEF NÁNDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128.
TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE

BUDAPEST V. JÓZSEF NÁNDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128.
TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST

La 56-a Universala Kongreso de Esperanto



Londono, la ĉefurbo de Anglujo kaj Britujo, ĉi-jare de la fino de julio, ĝis la mezo de aŭgusto, estis la ĉefurbo ankaŭ de la Esperantistoj.

Tra la trafiknodoj de la urbego, el la kvin kontinentoj kolektiĝis homoj parolantaj la Internacian Lingvon. En London-Airport-Hearthrow, — unu el la plej grandaj kaj trafikplenaj flughavenoj de l'mondo—kaj en la konataj fervojaj stacidomoj de British Rail (Viktoria, Waterloo, Euston, ktp.) same kiel en la ŝiphavenoj aŭ sur la aŭtostradoj tage kaj nokte alvenadis grupoj, unuopuloj kun verdaj steloj klopodante atingi komunan celon, la 56-an Kongreson en Londono.

En la diversaj enurbaj trafikiloj (subteraj fervojoj, tipaj ruĝaj aŭtobusoj, diversspecaj ŝipoj sur la Tamizo, en la Londonaj taksioj,) plimultnombriĝis la pasaĝeroj portantaj verdan stelon kaj kongres-insignon.

De tago al tago pli ofte oni aŭdis Esperantan babiladon sur la historiaj placoj (Trafalgar, Piccadilly, Haupton, Court ktp), en la plej vizitataj konstruaĵoj (Whitehall, Palaco de S-ta Jakob, Buckingham, Guildhall) kaj en la mondfamaj parkoj bele zorgataj kie niaj gesamideanoj ĝuis en sunbrila pompo la vidindaĵojn.

El la neforgeseblaj travivaĵoj en la urbego havanta pli ol dek milionojn da loĝantoj estu permesite mencii la viziton en la Brita Muzeo (ĝiaj ĉefaj partoj estas la Arkeologia, Biblioteka kaj la Kolekto de Presaĵoj kaj Desegnaĵoj) aŭ en la Naturscienca Muzeo, kie ni vidis inter alie la ekspoziciitan originalan (ne modeloj!) Puffing Billy (1813), kaj Rocket (1829) la unuan vaporlokomotivon. Same estis unika travivaĵo post tri-kvaronhora surtamiza ŝipekskurso la vizito en Grenviĉo (Greenwich) kie i. a. funkcias Reĝa Observatorio malnova. Ĝia meridiano — kiel konate — estas internacie akceptita *origina meridiano*. Estis videbla la latuna strio, kiu markas ĝin. (Se oni "rajde" staras super ĝi, unupiede oni staras en la okcidenta, kaj per la alia piedo en la orienta duonsfero.)

Bedaŭrinde ĉi-okaze ne estas loko okupiĝi pri multaj travivaĵoj, ni devas ja, eĉ se mallonge, raporti pri la kongreso mem. S-ro Peter Studd la lordurbestro de Londono, alta protektanto de la kongreso, en siaj salutvortoj i. a. diris: "Mi gratulas al ĉiuj, kiuj prizorgis la organizon de la Kongreso. Por grupo da libervolaj laboruloj estas konsiderinda atingo sukcese aranĝi konferencon en Londono por proks. 2000 personoj el 40 landoj dum la pintoperiodo de la turisma sezono". Kaj vere, ni ĉiuj estis rajte fieraj en la grandega luksa halo de Royal Festival Hall, kiam okazis la inaŭguro de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto, Estis rekono ankaŭ la fakto, ke la kongresejo funkciis en la Universitata Kolegio, en la novaj konstruaĵoj de la Universitato de Londono. En ĝi laboris la estraro, la komitato, la komisionoj ktp. kaj la rezultoj estis gratulindaj.

La ĉefaj temoj estis la lingva komunikado en la moderna mondo, la agado en Eŭropo kaj la principo de neŭtraleco. El la decidoj de la kongreso, mi citas nur la *Kongresan Rezolucion*.

„La 56-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Londono de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1971, en la ĉeesto de 2100 reprezentantoj el 40 landoj.

1. Notas kun kontento la grandan interesiĝon, kiun elvokis ĉe la publiko de la kongresa lando kaj internacie la ĉeftemo de la Kongreso "La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo", pritraktita en formo de Forumo en la ĝenerala kunveno de la Kongreso la 4-an de aŭgusto.

2. Esprimas sian dankon al la raportintoj, al British Council, Goethe Institut kaj aliaj institucioj aŭ organizaĵoj pro iliaj kontribuoj kaj atento.

3. Konstatas, ke la prezentitaj raportoj, aldonaj raportoj kaj kontribuoj ankoraŭfoje evidentigis la eksterordinaran gravecon de la problemo de interkomunikado per lingvo en internaciaj rilatoj en mondaj kadroj, ke tiu problemo postulas urĝan solvon, por kiu, pro la konfliktantaj interesoj de la naciaj lingvoj, la neŭtrala Internacia Lingvo prezentiĝas kiel la plej racia solvo.

4. Komisias la Estraron de Universala Esperanto-Asocio komuniki tiun ĉi Rezolucion al Unuiĝintaj Nacioj, al U.N.E.S.C.O., al reprezentitaj institucioj kaj aliaj interesitaj internaciaj kaj naciaj instancoj."

D-ro István Bácskai

Vilmos Benczik:

PASIA KOMUNIKEMO

[Pri la publicistiko de Julio Baghy]

Pri la multfaceta aktivado de Julio Baghy jam ofte oni skribis: nia publiko scias, ke li estis ne nur poeto, sed ankaŭ eminenta (eĉ, eble pli eminenta) prozisto, ne nur lerta lingvoinstruisto, sed ankaŭ pasia publicisto. Ĝis nun tamen malmulte oni aprecis lian produkton en tiu ĉi lasta branĉo de la skribarto.

Baza karakterizaĵo de bona publicisto estas la pasio, kiun nia aŭtoro tute ne malhavis, sed li estis dotita ankaŭ per la ceteraj karakterizaj trajtoj de bona publicisto, kiel interesiĝo pri la problemoj de la homaro, vervo kaj impresa stilo. Relegante liajn verkojn beletristikajn, oni trovas multajn elementojn, kiuj estas propraj al la publicistiko. Pritaksintoj de lia beletra verkaro prave riproĉis al li, ke ofte li lasis sin kuntreni de la vervo kaj pasio, kaj mankis al li pacienco ĉizi, fajli la verkon. Sed tio, kio ĉe beletraj verkoj klasiĝas kiel manko, ofte apartenas al la ĉefaj virtoj de bona gazetartikolo.

Jes, al Baghy mankis la pacienco sekvi la Horacan konsilon: li bezonis rektan kaj tujan kontakton kun la leganto. Al tiu ĉi pasia komunikemo nia ĵurnalismo dankas sian — post Zamenhof eble la plej persistan kaj plej sindonan — eminentan kultivinton.

En la tridekaj jaroj, sed ankaŭ post la dua mondmilito, ofte ni renkontas lian nomon sub gazetartikoloj, foje-foje de ŝajne senpretenda temo. La gamo de lia interesiĝo estis tre vasta. Egalmezure lin okupis la problemoj de la Esperanta kulturo, la organizaj demandoj kaj dilemoj de la Movado, la socia justeco, la estonto de la homaro. Maloftas en nia literaturo verkistoj de lia nivelo, kiuj verkis tiom da artikoloj, kiel li. Kaptita de la pasio li forgesis pri siaj "literaturaj interesoj", kaj ne bedaŭris uzi sian talenton por efemeraj, sed momente tamen gravaj problemoj. Lia profunda demokratismo ekskludis la enfermiĝon en la "ebura turo": ĝi estis naskinto kaj entoniginto de lia publicistiko.

La demokratismo difinis lian sintenon ankaŭ en la konata diskuto pri la neologismoj. Malgraŭ tio, ke la evoluo ne lin pravigis, oni ne povas dubi, ke lia starpunkto estis necesa kontraŭpezo de la troa vortnaskemo de la LM-skolo. Eksiĝinte el la redakcio de Literatura Mondo li konservis por si propran rubrikon en la revuo kun intime persona tono. Fakte per tiu rubriko komenciĝas lia kariero de altnivela publicisto. En tiu rubriko li eksplikas per katene viva, originala stilo siajn pensojn pri la literaturo, kulturo, lingvo, kaj pri la tuta vivo. Lia pasia interesiĝo pri la mondo neniam malfortiĝis en li: avide li ensorbis ĉiun novan informon kaj ne ŝparis la fortojn pensadi pri ili kaj kompreni ilin. En lia kapo ĉiam are svarmis pensoj, kaj lia pleja deziro estis komuniki tiujn pensojn al la homoj, kiujn senrezerve li amis ĉiujn.

Konante lian homamon, oni ne miras spertante lian intensan interesiĝon pri la estonto de la homaro. Kvankam li kredis en la homa prudento, time li alrigardis ĉiun novan jaron: kiel transvivinto de du mondmilitoj li kapablis imagi la detruon de la tria. En la lasta jardeko de sia vivo kiel altranga funkciulo de la Hungara Esperanto-Asocio ofte li oratoris en diversaj kunvenoj. Liaj paroladoj — eĉ kiam lin jam torturis pezaj malsanoj — ĉiam impresis per sia aktualeco kaj respondecemo, neniam la sortproblemoj de la homaro estis preteratentitaj. Eĉ sepdekjaran lin ne kaptis la malsano de la maljunuloj, la rememoremo, ĉiam li rigardis antaŭen. Depende de la aktualaj cirkonstancoj kaj atmosfero li parolis ĉu pri la danĝero de la eksperimentaj nukleaj eksplodigoj, pri la akumuliĝanta kvanto de la stroncio—90, ĉu pri la ora epoko, kiun helpe de la moderna tekniko la homaro povos krei por si. Ne unu el liaj paroladoj poste aperis en preso — tiam montriĝis, ke ili estis ne nur pasiaj, sed ankaŭ kompetente konstruitaj — sed pluraj troviĝas jam nur maksimume sur magnetofonbendoj de privatuloj. Estus grava damaĝo por nia kulturo, se ili perdiĝus.

En la espereble iam aperonta Plena Verkaro de Baghy la gazetartikoloj kaj paroladoj devos okupi indan lokon. Unua paŝo de la antaŭpreparoj devas esti konscienca kolektado de liaj verkoj (kaj ne nur de la beletraj!), kiuj ŝimas dise en gazetoj, eĉ bultenetoj. Japanoj en *Aŭtunaj Floroj* kunkolektis parton de liaj dise aperintaj poemoj. Kompreneble ili estas dankindaj pro tio, eĉ se plimulto de tiuj poemoj ne hazarde forrestis el liaj poemaroj. Sed kiel valora por nia kulturo estus bona kolekto el liaj artikoloj!

La redakcio de Hungara Vivo — por ebligi la iaman eldonon de lia Plena Verkaro — decidis komenci la dokumentadon de liaj publikaĵoj. Baghy havis demokratiajn principojn ankaŭ en la elekto de la periodaĵoj — ofte li donis artikolon eĉ al redaktoroj de grupaj bultenoj — sekve la kolektado estas ekstreme malfacila. Ni decidis turni nin al niaj legantoj, petante ilin alsendi periodaĵojn, kiuj enhavas kontribuaĵon de Baghy. En la kazo, se la posedanto ne povas malhavi la koncernan numeron, nin multe helpos ankaŭ la necesaj bibliografiaj indikoj: nomo, jarkolekto, numero, aperdato, aperloko de la periodaĵo, numero de la paĝo(j), sur kiu

la verko troviĝas, titolo kaj ĝenro de la verko. La samon ni petas ankaŭ koncerne recenzojn pri liaj libroj aŭ artikolojn pri li.

La vivoverko de Baghy estas ekstreme riĉa kaj varia. Malkovro de la nekonataj valoraĵoj estus nepre multe utila por nia rigidiĝanta kulturo, precipe en la malmulte kultivataj ĝenroj. Ekz. li estis ĝis nun eble la sola apostolo de la Esperanta dramaturgio kaj teatro. Konatiĝo kun liaj dise aperintaj unuaktaĵoj estus nepre profitiga entrepreno.

Nun staru ĉi tie kelkaj fragmentoj el lia publicistiko, kiuj eble povos veki la intereson de la legantoj por tiu ĝis nun malmulte atentita, sed tre valora parto de lia verkaro.

El la artikoloj de Julio Baghy

„Sur ĉiu kontinento, en ĉiuj landoj ĉu sendependaj aŭ protektataj, ĉu kolonioj aŭ liberiĝintaj, la gazetaro ĉiutage komunikas parafrazojn, bombaste multpromesajn deklarojn pri la PACO, sed ... sed ni, unuopuloj en la centmilionoj, mem la centmilionoj ĉiam malpli komprenas la elokventaĵojn kaj volonte krius al la mondsuverenoj: „Per simplaj vortoj! Eĉ plisimple! Homece!" "

„Diplomatoj de la mondo — mi demandas — kio okazus, se foje vi ĉiuj flankenpuŝus la parafrazan elokventadon, la multpromesan bombastadon, kaj responde al la krio malespera „Per simplaj vortoj!", postulata de timo pri estonteco, vi ĉiuj — antaŭ ol eksidi al la ronda tablo de la traktadoj — amike reciproke manprenus, frate ĉirkaŭprenus unu la aliajn kaj lasus la koron malfermita, ke superombru ĝin la sentoj: fido, komprenemo, homa solidareco."

‚Feliĉe la moderneco ankoraŭ ne sukcesis ekstermi la eternan virinon. Malgraŭ ĉio filinoj de Eva heredas la karakterizajn ecojn de sia prapatrino Eva, kiu faris homan hejmon el la kaverno de urso, plibeligis la ĉiutagan grizecon, inspiris celojn en la vaneco kaj per siaj sonĝoj devigis Adamon krei lukson. La lukson de formoj kaj esprimiloj. Tiamaniere la virino fariĝis etika bazo de la hejmo kaj de la socio. Sen virino la viro dronus en nenifaro kaj sen viro la virino velkus pro senceleco. La eterna duo, la sinpelado reciproke plaĉi unu al la alia faras la vivon tuta. Jes, ili kune faras ĉion tuta, prospera kaj triumfe venka. Do, ankaŭ nian aferon: la Esperantan movadon."

„... kaj ni... jam sentas, ke danĝere konsumiĝas la kaŝitaj trezoroj kaj ke anstataŭ viviga ozono de la VIVO ni inhalas venenitan spiron de la MORTO. Ĉiutage ni vidas — vole-nevole ja devas vidi —, ke iom post iom ni mem detruas, neniigas ĉiun premison, ĉiun racian rimedon de la vivkonservado. La centmiloj kun terurstreĉitaj okuloj spirretene rigardas al la fungoformaj nubegoj de la eksplodintaj atom- kaj hidrogenbomboj, kiuj sugestas la penson, ke *supre* ne ekzistas Dio, nur STRONCIO 90, kaj *malsupre* ne plu estas Homo, nur furiozanta Marsanido kun la malvasta egoisma principo „Ĉion por la potenco!"... kaj... centmiloj, de volo senigita frataro, kies sango fluas sur la trotuaroj de la grandaj urboj kaj kies sangon soife sorbas la sablo dezerta, kaj kies sango makulas la murojn de la ekzekutejoj, kaj kies sango neforlaveble sekiĝas sur la animo de la murdistoj..."

„... la grekoj estis majstroj de la formo ekstera en tiu epoko, kiam la egiptoj, hindoj, ĉinoj superis ilin en la artoj de la formo interna. Tamen ne estu miskompreno! Neniel mi deziras aserti per tio, ke la greka antikva kulturo estis malpli valora kaj malpli epokfara *por Eŭropo* kaj ke ĝi ne havis majstroverkojn ankaŭ en la artoj de la formo interna. Objektive: Oriento prefere kultivadis tiujn artojn, kies bildoj formiĝis interne sub influo de senbrida fantazio; Okcidenton influis pli la realaĵoj. El la reciprokaj efikoj dum longdaŭra paco povos formiĝi nova, internacia kulturo, en kiu ekvilibran proporcion havos ĉiu grupo de la artoj."

„Neniam tiel favorajn cirkonstancojn nia kulturmovado havis en Hungarlando kiel nuntempe, kiam la ŝtata eldonejo aperigas gramatikojn en 34 000 kaj 10 000 ekzempleroj, kiam la ĵurnaloj, gazetoj ĉiusemajne jen tie jen aliloke aperigas artikolojn pri la lingvo, kiam en la Hungara Scienca Akademio scienculo pritraktas la neceson de la lingvo internacia, nome Esperanto, kiam en du Universitatoj oni instruas nian lingvon, kiam en centoj da lernejoj la pedagogoj havas la rajton instrui ĝin, kiam la Hungara Esperanto-Asocio ricevas financan subtenon kaj kiam la konstanta kresko de la membroj ne nur ebligas, sed postulas ĉiujare plurajn renkontiĝojn, somerajn tendarojn kaj seminariojn..."

Ĉu plaĉas al vi HUNGARA VIVO?

Surpizu viajn amikojn: abonu ankaŭ por ili!

MEDICOR MEDICOR

MEDICOR MEDICOR

MEDICOR MEDICOR



MEDICOR
BUDAPEST

INFLUAS FAVORE LA CENTRAN NERVARON

— malpliigas la sangotension
— akcelas produktiĝi la D-vitaminon
— pliigas la rezistemon de la organismo kontraŭ malsanoj
— egalmezure brunigas

la
KVARCLAMPO MEDICOR
FABRIKATA KAJ EKSPORTATA DE
UZINO MEDICOR
MEDICOR MŰVEK

MEDICOR MEDICOR



GYULA FELEDY

Li naskiĝis en 1928, kaj kiel lia patro, ankaŭ li komencis vivon de ministo. Jen kial en liaj desegnaĵoj kaj akvafortoj aperas ofte la figuro de la ministo. Li studis unue en la Budapeŝta Belarta Altlernejo, poste li daŭrigis siajn studojn kaj fine ricevis diplomon en Krakovo. Oni aranĝis lian unuan memstaran ekspozicion en Krakovo, en 1952, kiam li estis tie ankoraŭ studento, kaj la unuan prezentiĝon sekvis pluaj en Budapeŝto, Prago, Vieno kaj en 1966 en la Venecia Bienalo.

Li vivas en la provinco, la karakteron de la belarta vivo de nia granda fabrikurbo, Miskolc, donas lia ĉeesto kaj laborado. Li estas unu el la gvidantaj figuroj de niaj mezaĝaj belartistoj. En la ekspozicioj de hungara grafikarto li rolis jam en Delhi, Lugano, Tokio, Sao Paulo, Londono, Parizo, Moskvo, Ankara; eble en ĉiuj europaj ĉefurboj. Kaj kompreneble hejme li partoprenas en ĉiuj pli grandaj belartaj eventoj. Pro liaj kreaĵoj li ricevis jam premion plurfoje, kaj oni honorigis lin per la Munkácsy-premio dufoje.

Kio karakterizas ĉefe lian arton? — Lia inklino atingi pli novajn, modernajn kompoziciojn, rimedojn, teknikojn. Kiel pentristo li kreas siajn modelojn en interesaj kompozicioj kaj per sugestivaj koloroj.

— *gm* —

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160



La Komuno de Parizo

centjara

„Nur masonisto li estas? Kaj ŝtaton direkti li volis?" — sonis konsternita krio de franca kolonelo, kiam oni eskortis antaŭ lin iun direktanton de la Komuno. Dise en Parizo dume soldatoj masakris surstrate sub protekto de la malamika prusa armeo. Maro da sango, torturoj, la venĝo de la regantaj klasoj metis finon al la unua regpotenco de la moderna laboristaro, en Majo de 1871. Historie mallongega, sed despli grava etapo, kvazaŭ ŝtupo estis la regado de la Pariza Urba Konsilio, de la pariza popolo, ŝtupo certe por la venontaj grandaj revolucioj, por la triumfoj postaj.

Neatendite, sen longaj preparoj venis la ribelo, pelate, kiel tiom ofte jam, de la regantoj, inter la ege mizeraj, sufokaj cirkonstancoj por la popolo. Dum la prusa-franca milito, post bankroto de Napoleono la III-a, la franca grandburĝaro rapide prenis la potencon por fari kompromison kun la prusoj. La nova reakcia registaro por la kapitalistoj volis utiligi la pezan situacion, la packontrakton, lasante ĉiajn malbonajn konsekvencojn por la popolo, kiu nun kuraĝe volis savi de la germana okupado sian patrujon. La trompaj intencoj de la registaro rapide klariĝis por la parizanoj. Ne forgesinde: ili havis ja profundajn revoluciajn tradiciojn, multajn spertojn de la politikaj luktoj, krome abundon da raciaj kapoj, gvidkapablaj revoluciuloj. Afiŝoj, ĵurnaloj, oratoroj diskriis la klaran elirvojon: La potencon devas preni mem la popolo! La Komuno de Parizo regu! Kontraŭstari la prusajn sieĝantojn de la ĉefurbo, liberigi de la malamika armeo Francujon sen ia rabema packontrakto, jen la taskoj de la patriotoj. Tamen ĉio ĉi ne eblis alie, ol kontraŭ la registaro, la grandburĝoj, kiuj jam kooperadis kun la malamika armeo, kun Bismarck por savi sian superecon.

Dum tiu lukto la civilgvardio kuniĝis, kreis ligon kun centra komitato — nova potenco leviĝis! La interbatalo de la klasoj abrupte alportis venkon por la popolo — la 18-an de Marto — kiam soldatoj kaj popolo interfratiĝis, kaj la potenco transiris en la manojn de la urba konsilio: *ekregis la Komuno!*

Metiistoj kaj laboristoj, oficistoj kaj inteligentuloj, plejparte nemarksistoj konsistigis la Komunon (konsilion), funkciantan kiel registaro, novmaniere kune kun la popolo, kreante, se diri la esencon, la *diktaturon de la proletaro.* Oni levis la salajrojn, prokrastis la preman lupagon de loĝejoj, redonis la garantiajn deponitaĵojn; senpaga kaj deviga iĝis la elementa lernejo, disiĝis eklezio kaj ŝtato. La katenojn de la kapitalismo ekrompis la Komuno, tamen la tempo ne sufiĉis fini tion.

La aferojn de laboro kaj komerco direktis populara hungara revoluciulo, *Leo Frankel* (1844—1896) juvelisto el Buda. Amiko de *Bebel* kaj *Liebknecht*, aktivulo de la Internacionalo, li kiel ministro kreis kooperativojn por la senlaboruloj, perantejojn por laboristoj, kaj famiĝis per socialaj kaj preventaj disponoj. Kiam la potencperdintaj klasoj armile atakis Parizon, helpate de la prusa armeo, dum la strataj bataloj, sur la barikadoj, inter la sindonaj, heroaj defendantoj luktis ankaŭ Frankel, kaj, grave vunditan, feliĉe preteris lin la venĝo. En Anglujon li fuĝis, interamikiĝis kun *Marx* kaj *Engels*, kaj post jaroj, hejmenveninte, li fondis la *Hungarlandan Laboristan Partion.* La konscian redaktoron kaj politikiston la hungara feŭda-burĝa registaro baldaŭ enkarcerigis por jaroj, poste tute malebligis lian ekzistadon en la lando. Frankel denove aktivis en Francujo, precipe por la Dua Internacionalo, apud Engels.

Krom Frankel pluraj hungaroj aliĝis al la revolucio kune kun multaj aliaj fremduloj, vivantaj ekzilite en Parizo. Dum la *„sanga semajno"*, la daŭra atako de la kontraŭrevolucianoj, la sieĝataj parizanoj en vera internacia etoso defendis la barikadojn, la domojn, kaj poste kune suferis la morton (30 mil homoj senjuĝe ekzekutitaj), la senindulgajn kondamnojn. La terura venĝo tamen vanis: la fundo de la proleta revolucio estis mem la kapitalismo, nove-denove naskanta daŭre la lukton por igi libera la proletaron. Kaj ĉi tiu havis jam en la Komuno antaŭ si heroan ekzemplon kaj spertodonan modelon.

Kie la lastaj defendantoj de la Komuno akceptis la morton kaj sian tombon, ĉe la fama *Muro de la Komunardoj* en la pariza tombejo *Père Lachaise;* tie poste oni enterigis ĝian fidelan anon, la unuan gravan gvidanton de la hungaraj laboristoj, Leo Frankel.

Ervin Fenyvesi

Kompletigu la jarkolekton de Hungara Vivo!

Multaj niaj legantoj demandis letere kaj persone, kiel kompletigi la jarkolekton de H.V.? Ni havas ankoraŭ malnovajn ekzemplerojn, kvankam ne el ĉiuj numeroj; ili estas mendeblaj de Hungara Esperanto- Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező u. 6. Hungario. Prezo de unu ekzemplero estas: el la jaroj 1964—1968: 2 forintoj (O. 20 dolaro), el 1969 5 forintoj (O. 40 dolaro), el 1970 kaj 1971 8 forintoj (O. 50 dolaro). Poŝtkosto de unu ekzemplero: 1 forinto, eksterlande 0.20 dolaro aŭ egalvaloro alivaluta.

Por ĉiuj partoj de la mondo akceptas la fabrikadon de

baletŝuoj

por piedpintado kaj ekzercigo,

popoldancaj botoj

kun mola kaj malmola kruringo, kaj diversaj

popoldancaj kostumoj

Kostumfabrikanta kaj pruntanta entrepreno

JELMEZKÉSZÍTŐ
ÉS KÖLCSÖNZŐ VÁLLALAT

BUDAPEST, V., BÉCSI U. 3–5.
HUNGARIO

Reprezentanto por internacia komerco:

Entrepreno Hungarofilm Vállalat

BUDAPEST. V., BÁTHORY U. 10
HUNGARIO



Juneco, juneco

Jam iĝis kvazaŭ subrubriko de *"Juneco! Juneco!"* la kalendaro de la eventoj la junularon eble interesantaj. Ekde tiu ĉi numero vi trovos apartan kalendaron sur alia paĝo, kiu enhavas la daton kaj la anonceblon de ĉiuj — do, ne nur de la junularaj — eventoj.

Ĉi-jare aperas la jarlibro de la Scienca Studrondo Esperantista de la Universitato Loránd Eötvös en Budapest. La jarlibro enhavas ĉefe sciencajn kaj literaturajn verkojn de la nunaj kaj estintaj rondanoj, sed krome ankaŭ artikolojn el la plumo de la instruista estro de la Studrondo, de profesoro *Szerdahelyi* kaj ankaŭ de profesoro *Géza Bárczi* kaj aliaj.

Alia sciigo el la universitato: oni anonciĝis el *Madagaskaro*, ke oni volas iĝi koresponda studento de Esperanto. Ni esperas, ke tiaj anonciĝoj akcelas la akiron de la koresponda sekcio — apud la dumtaga kaj vespera.

Sciigo muzika: du japanajn aninojn havas la virina ĥoro "Erzsébet Szilágyi" de la HVDSz; ili venis al Hungario por studi la tiel nomatan Kodály-metodon. Ili vizitadas la kantolecionojn de la lernejoj, la prezentadojn de aliaj ĥoroj, kaj preskaŭ ĉiujn eventojn de la hungara muzika vivo. Unu el ili estas eĉ stipendiulino de la japana ŝtato.

Ŝajne temas nur pri movada afereto: ĉi-somere reformiĝis la Junulara Komitato de la HEA. Ni esperas, ke la poaj subkomisionoj, apogante sin sur pli nombra anaro ol ĝis nun, faros tiel bonan laboron, ke la efikon de tio sentos kaj la junuloj enlandaj kaj tiuj nin vizitantaj.

Eŭropa Seminario de Mezlernejanoj en Budapeŝto

Ĉi tiun seminarion organizis KJA, subtenate de la Demokratia Mondfederacio de la Junularo kaj de la Internacia Unio de Studentoj. Okaze de ĝi, renkontiĝis junuloj el 21 landoj, kun plej diversaj religioj, mondkonceptoj kaj politikaj konvinkiĝoj. Fariĝis kvazaŭ la moto de la interkonsiliĝo, ke la reprezentantoj de la diversaj pensmanieroj devas sin kompreni reciproke, ĉar ĉies komuna celo estas, ke edukiĝu junularo progresema, fake bone edukita.

En la paroladoj temis pri la neceso de la lernejaj reformoj, kiuj devas realiĝi ne rezulte de poaj iniciatoj, sed per kontinua procezo sekvanta la rapidegan evoluon de la tekniko kaj sciencoj.

— La signifo de la seminario estas — klarigis unu el la delegitoj —, ke ni pli bone ekkonas unu la alian, se ni parolas pri nia vivo, niaj rezultoj kaj problemoj, kaj donas reciproke konsilojn.

La delegitoj havis tempon ankaŭ por promen-ŝipado, vizito de la Parlamentejo kaj la Junulara Parko, eĉ, farinte la komuninteresajn laborojn, ili ĝoje baniĝis en Balatono.

Kvar olimpikaj ĉampionecoj en 1971?

Jes, jen kiom akiris la hungara teamo de junaj matematikistoj, kaj — krom la poaj ĉampionecoj — ankaŭ la unuan lokon en la team-konkurso.

Temas pri la *13-a Internacia Matematika Olimpiko de Lernantoj*, kiun oni aranĝis en Zsolna (Zilina, Ĉeĥoslovakio) kun la partopreno de junuloj el 15 landoj.

El la ok hungaraj konkursantoj, antaŭpreparitaj de *István Reiman*, adjunkto de la Teknika Universitato, kaj *Endre Hódi*, docento de la Landa Pedagogia Instituto, kvar gajnis unuan premion kaj kvar gajnis premion duan.

Tia sukceso de la junaj hungaraj matematikistoj jam estas preskaŭa tradicio. Kio klarigas tion inter la konkursantoj de landoj kun tiel granda matematika kulturo, kiel *Britlando, Francio, Pollando, Sovetunio*?

"Niaj sukcesoj — diris István Reiman post la hejmenveno — havas minimume tri kaŭzojn. La unua estas la *tradicio:* matematikajn konkursojn oni aranĝis unue ĉe ni en la tuta mondo. La dua estas: la apreco de la matematika *estetiko*, kiu altiras la spertajn junulojn. Kaj la tria estas la aktiva okupiĝo pri la junaj talentoj. La "olimpika kadro" trejnas tutjare, kaj en la lastaj semajnoj sekvas komuna, eĉ pli intensa problemsolvado. Kaj nia profito el la konkurso estas, ke kreiĝas jam seriozaj scienculoj: matematikistoj, fizikistoj."

Junuloj pri filmoj

Okaze de la kongreso de KJF (Komunista Junulara Federacio) oni aranĝis ankaŭ filmtagojn: 20 000 junuloj spektis en 55 prezentadoj de 15 kinejoj 22 hungarajn filmojn, por povi partopreni en la konkurso de disertaĵoj pri la temo: *„La figurado de la junularo en la hungaraj filmoj de la pasintaj kvar jaroj"*. El la grandnombraj konkursantoj, la ĵurio, konsistanta el fakuloj, distingis per la unua premio la universitatan studenton *Tamás Tarján.*

TEJO-sekretario – hungarino

Dum la lasta kunsido en Edinburgh la komitato unuanime elektis hungaran juristinon Flóra Szabó kiel ĉefsekretarion de la TEJO.

Ŝi estas la unua virino en tiu ĉi posteno de la mondorganizo, nombranta membrojn el 27 landoj. Lastfoje mebriĝis GDR kaj Japanio.

Ĉar la administranta centro de la TEJO estas la loĝloko de la ĉiama ĉefsekretario, tial la organo estos direktata kaj la oficiala sciigilo — Informa Folio — estos redaktata el Pécs.

János Tóth

Ĉapitroj el la Hungara muzikhistorio

I. Nebula pasinto.

Inter la Eŭropaj muzikkulturoj troviĝas nur tre malmultaj, kies rilato al la praaj popolmuzikaj tradicioj estas eĉ nuntempe tiel strikta, kiel tiu de la hungara.

Ĉi tio havas du kaŭzojn. Unue, la hungara arta muziko nur en la nuna jarcento fariĝis vere altnivela kaj egalranga kun la Okcident-Eŭropaj muzikkulturoj. Due, la 150-jara okupado fare de la turkoj kaj la longdaŭra konserviĝo de la feŭdala sociordo vivtenis sentojn kaj ideojn mezepokajn, tenis izolitaj la urbojn disde la vilaĝoj, tiel ke la kamparana kanto estis kvazaŭ tute nekonata en la hungaraj urboj de la pasinta jarcento.

Jen grava kialo, pro kiu estas interese ekkoni la historion de la hungara muziko; ĝi donas ja interesajn respondojn pri kelkaj problemoj, kiuj ne aperas tiel klare en la muzikkulturoj aliaj, precipe okcidentaj. La nuntempa hungara muziko ligiĝas pli intense, pli freŝe al la praaj popolmuzikaj tradicioj, ol la muziko de multaj aliaj nacioj, ĉar ĝis la lastaj jardekoj la hungara arta muziko ne eluzis la folkloran muzikon tiamaniere, kiel la okcidentaj muzikkulturoj.

La esplorado de la popolmuzikaj radikoj en la nuntempa hungara muziko estas tamen ege komplika: ni ne devas forgesi, ke skribaj spuroj ne ekzistas pri tio, kion la hungaroj kantis en la frua mezepoko. Sed estas surprize, ke eĉ nuntempe hungaraj kamparanoj kantas kantojn, kiuj estas proksime parencaj kun la popolkantoj de kelkaj ĉinaj provincoj kaj de triboj de Centra Azio.

El tio konkludeble, la historio de la hungara muziko komenciĝas tiutempe, kiam la finnaj-ugraj kaj turkaj triboj ankoraŭ formis pli-malpli unuecan popolon en la Uralaj regionoj, eble plurajn jarcentojn antaŭ nia tempokalkulo. La tiutempajn melodiojn kantas hodiaŭ en Hungario jam nur la plej maljunaj kantemaj kamparanoj en malgrandaj vilaĝoj. Ilia morto signifos la formorton, la malaperon de tiu valora muzika trezoro. Vere lastmomente eklaboris do la du geniaj hungaraj muzikistoj — Béla Bartók kaj Zoltán Kodály — vizitante la plej kaŝitajn hungarajn vilaĝojn komence de nia jarcento por konservi skribe kaj fonografe la praan heredaĵon de popolaj kantoj, ankoraŭ pure kantataj. Dank' al ili la muzikscienco, precipe la esplorado de la folklora muziko, estas nun tiel progresinta en Hungario, ke ĝi fariĝis ĉie konata kaj laŭdata de la fakuloj tutmondaj.

Kiam la hungaroj, en la 9-a jarcento, okupis la hodiŭan Hungarlandon, ili certe kunportis sian muzik-trezoron. Kaj kiam ili aliĝis al la Okcidenta kulturo, akceptis la kristanismon, fariĝis parto de la tiama Eŭropa mondo, samtempe ili renkontiĝis ankaŭ kun la kristana muziko, kun la gregorianaj melodioj. La kristanismo estis certe pli alta grado de historia progreso ol la socio de la triboj, kie la ŝamanoj kantis siajn sorĉmelodiojn al la dioj loĝantaj en ĉiu angulo, ĉiu arbobranĉo, en riveroj kaj montoj. Sed multaj homoj tiamaj sentis sin pli liberaj en la pagana socio ol en kristana. Tial dum longa tempo daŭris bataloj inter la partianoj de la novaj tempoj kaj la fideluloj de la pasinto. La nova religio venkis, la praaj paganaj ritoj kaj kantoj grandparte pereis, sed kelkparte kaŝiĝis, pli-malpli transformiĝinte, inter la popolo, tiel ke iliaj restoj estas troveblaj eĉ en niaj tagoj inter la popolkutimoj kamparanaj.

En la kristana frua mezepoko plu vivis en Hungario kelkaj hungaraj melodioj aŭ melodio-turnoj. La gregorianaj melodioj, kies notado komenciĝis en la 11. jarcento, montras en la tiamaj notoj kelkloke hungarajn intonaciojn. Konstati tion estas ofte tre komplike, ĉar la solvo de la tiutempa muzik-notado (la t.n. skribmaniero per *neumoj)* postulas apartan studadon kaj esplorojn. La Hungara Universitata Biblioteko gardas ekzemple treege interesan muzikan manuskripton el la 14. aŭ 15. jarcento, kiu jam estas kvazaŭ de hungara karaktero. En ĉi tiu kazo — kaj en kelkaj similaj kazoj — ni povas jam konstati la kunfandiĝon de gregorianaj kaj antikvaj hungaraj tradicioj. *(Daŭrigota.)*

Lajos Lesznai

1972: Libro-Jaro

La jaron 1972 la ĵusa Ĝenerala Konferenco de Unesko proklamis Internacia Libro-Jaro. Oni esperas atentigi la tutmondan publikon pri la defiaj problemoj tiukampaj. En kelkaj landoj jam abundas, kaj eĉ superabundas libroj, sed temas pri ĝuste tiuj landoj, kie abundas ankaŭ aliaj rimedoj por komunikado (televido, radio, filmoj, ktp.). Duono de la verkoj ĉiujare eldonitaj aperas en nur sep landoj (nome: Francujo, Germana Federacia Respubliko, Japanujo, Hispanujo, Sovetunio, la Unuiĝinta Reĝlando, kaj Usono), en kiuj loĝas nur kvinono de la monda loĝantaro.

La problemoj estas organizaj, leĝaj, financaj: oni devos esplori ĉiajn rimedojn por havigi librojn al tiuj, kiuj avidas ilin, je prezo sufiĉe malalta. Necesas ankaŭ esplori la eblojn plivastigi la bibliotekajn servojn. Oni ne rajtas ignori la verkistojn: malaltkosta vendado kaj senpaga pruntado devas ne minaci iliajn justajn postulojn de taŭga enspezo. Alie ili ne povos verki, kaj novaj verkistoj estos netroveblaj.

"Libroj por ĉiuj!" — jen la slogano por la jaro 1972, kaj por la estonteco.

(Laŭ Unesko-novaĵoj kaj Informa Servo de UEA)

BAR-KOĤBA-LUDO

La hungara televido renovigis ĉi tiun societan ludon, kiu iam, inter la du mondmilitoj, estis granda modo en Budapeŝto: ĝin ŝate ludis ankaŭ elstaraj literaturistoj, kiel ekz-e Frigyes Karinthy, Dezső Kosztolányi, Lajos Nagy, Ferenc Molnár; estas eĉ tre supozeble, ke iu el ili retrovis aŭ eltrovis la ludon. Mi ne scias, kiom la ludo estas konata eksterlande; ĉiuokaze, mi konigas ĝin tie ĉi, precipe, ĉar mi opinias, ke oni povas ĝin bone ludi en niaj klubkonvenoj.

La ludo okazas tiel, ke iu el la societo eliras el la ĉambro, kaj poste la societo interkonsentas pri io aŭ iu (objekto, persono, besto, nocio), kion aŭ kiun la elirinto devos diveni. Ĉi tiu revenas kaj metas demandojn. Iu respondas la demandojn, sed nur per *jes* aŭ per *ne*. Per ĉiam novaj demandoj la divenonto striktigas la rondon ĉirkaŭ la divenotaĵo, ĝis fine li trovas ĝin precize. Tiam li diras: „*Mi pridemandas: ĉu . . .*" kaj nomas la serĉatan vorton. Post tio, se li maltrafis, li ne povas plu demandi: li perdis la ludon.

Eble unu ekzemplo metos la aferon pli klara ol la supra eksplikado. Jen demandoj de komenco ĝis la solvo:

Ĉu objekto? Ne. *Persono?* Ne. *Nocio?* Ne. *Senviva?* Ne. *Vivanta?* Ne. *Vivinta?* Ne. *Fikcia?* Jes. *Besto?* Jes. *Unu certa besto?* Jes. *Mitologia?* Ne. *Sovaĝbesto?* Ne. *Dombesto?* Jes. *Ies dombesto?* Jes. *Gardobesto?* Ne. *Ŝarĝobesto?* Ne. *Rajdobesto?* Jes. *Ĝia mastro estas epopea figuro?* Ne. *Romanfiguro?* Jes. *La aŭtoro estas hungara?* Ne. *Okcident-Eŭropa?* Jes. *Franca?* Ne. *Pli suda?* Jes. *Hispana?* Jes. *Nuntempa?* Ne. *Malnova?* Jes. *El la „ora jarcento?* Jes. *Tre fama?* Jes. *Temas pri kavaliro?* Jes. *Pri lia rajdobesto?* Ne. *Pri tiu de lia servisto?* Jes. *Mi pridemandas: La azeno de Sancho Pansa?* Vi trafis.

La leganto certe scivolas, de kie la nomo de la ludo: *Barkoĥba ludo, barkoĥbado?* Nu, unue ni vidu, kiu estis Barkoĥba? Li gvidis la lastan libermiliton de la judoj kontraŭ la romianoj (131—135 p. K.). Origine li estis Bar-Koziba, sed liaj partianoj ŝanĝis tiun nomon je Bar-Koĥba, kiu kaldee signifis Filo de Stelo, por povi al li rilatigi la Biblian antaŭdiron (Libro IV. de Mozeo, 24, 17), laŭ kiu „eliros stelo el Jakob . . ." por pereigi la malamikojn. Fakte, Bar-Kohba forpelis la romianojn, restarigis sendependan judan ŝtaton, stampigis ankaŭ monerojn. Fine lin venkis *Severus,* militestro de cezaro Hadriano.

Oni rakontis, ke la romianoj foje, kaptinte spionon de Bar-Koĥba, ne mortigis lin, sed, por kruela moko, eltranĉis lian langon kaj sendis lin al Bar-Koĥba, mutigitan. Ĉi tiu tamen ricevis de la mutulo ĉiujn informojn tiel, ke li lerte demandis, kaj la mutulo devis respondi nur jese aŭ nee, per kap-movo. Per ĉi tiu rakonto la ludo estis interese subpentrita; ĝi ricevis, se tiel diri, historian fundamenton.

Iu historiisto trovis la aferon suspektinda kaj ne domaĝis la penojn serĉi pri ĝi aŭtentikajn fontojn. Fine li demonstris, ke ne ekzistas tiaj fontoj, la historieto estas fantazia legendo, eltrovita verŝajne de la ellaborinto de la ludo. Sed neniu anoncis sin por pretendi la aŭtorecon; tiamaniere tamen restis kelka mistero ĉirkaŭ la afero.

La solvo povas postuli konojn specialajn, ekzemple ĉe la taskoj: La virkapro oferita de Abrahamo anst. Isaako; la cigno de Lohengrin; la tuko de Desdemona; la venenita rapiro de Laerto; la simbolo *pi* (3,14); la ŝtiparo de Giordano Bruno; la nazo de Kleopatra; la formulo de Heisenberg; la koncerto de Jankjel en Sinjoro Tadeo. Pli ĝenerale alireblaj estas: La fianĉina ringo de la grupa prezidant-edzino; krokodilado; preseraro; televidil-paneo; Cseh-metoda kurso; UEA-delegito ks. La ludo, krom amuzo, povas esti ankaŭ instrua, se oni metas taskojn tiacelajn: titolojn de gravaj E-aj literaturaj verkoj, gravaĵojn kaj gravulojn de nia movado kaj historio. Ĝi allogas per tio, ke la societo vole-nevole aŭskultas atentostreĉe la demandadon, ofte malfacile sin detenas de suflorado, kiam la demandanto palpadas misdirekte. Lerta demandanto povas helpi sin ankaŭ per legado el la mienoj, ne ĉiu havas ja pokeran vizaĝon.

Mi finas per speciala E-a divenotaĵo:

Ĉu objekto? Ne. *Persono?* Ne. *Nocio?* Jes. *Abstraktaĵo?* Ne. *Ago?* Jes. *Per instrumento?* Ne. *Per mano?* Ne. *Per piedo?* Ne. *Per kapo?* Jes. *Per la tuta?* Ne. *Per la okuloj?* Ne. *Per la buŝo?* Jes. *Por nutro?* Ne. *Parolo?* Ne. *Tuŝo?* Jes. *Lipotuŝo?* Jes. *Ĝenerale?* Ne. *Unu certa kiso?* Jes. *El seksa amo?* Ne. *El parenca amo?* Ne. *Viro ĝin donis?* Jes. *Al virino?* Ne. *Al viro?* Jes. *El homfrata amo?* Ne. *Amŝajnige?* Jes. *Perfide?* Jes. *En la antikvo?* Ne. *En nia jarcento?* Jes. *En ties unua jardeko?* Jes. *Ĝi rilatas E-on?* Jes. *Similas kison de Judaso?* Jes. *Mi pridemandas: la kiso de Beaufront donita publike al Zamenhof.*

K. Kalocsay



LA EMBLEMO GARANTIAS LA KVALITON!

Fabrikas
modernajn,
longe daŭrajn meblojn

LIGNOINDUSTRIA KOOPERATIVO EN PÉCS

HUNGARIO

PÉCSI FAIPARI KTSZ

KÁROLY TAMKÓ SIRATÓ

VAGABONDA PAUL'

Frat',
fraŭl',
franda
fraŭl'.

Kie iras Paŭl'?

Ĉu ĉe l'maro?
En montaro?
Tra l'tondranta
Niagaro?

Kie vagas
forsopira,
vulkan-ira,
nubo-ŝira
vagabonda Paŭl'?

En Bajkalo, fiŝa balo;
tie li sub akvofalo

ĉerpas ŝaŭmon kaj bobelojn
por trinkigi la libelojn,

lumfanfaron li trumpetas,
neon-veston sur sin metas,

ŝtormboaton reme rajdas,
kie flama maro tajdas,

kosmoŝipe li veturas,
kun Ĉiela Ĉar' vetkuras,

per sorĉkanto, sorĉ-arpeĝo
venkas super la Frost-reĝo,

glitas sur elektraj nuboj,
migras tra la maraj suboj.

Frat'
fraŭl',
franda
fraŭl',

venu hejmen, Paŭl'!

Kial nun vi
vage folas,
mi jam kun vi
ludi volas.

Venu hejmen
el la disto
kaj ne lasu
min en tristo,

ronda,
blonda
vagabonda
vagabonda Paŭl!

Trad.: Péter Rados

Sporto

La hungaraj jungaĵistoj partoprenis en 1964. la unuan fojon la internacian jungaĵkonkurson en Aachen (GFR) kaj gajnis la unuan premion de la memorkonkurso Talbot, la kunmetita disciplino de la konkurso kun brustorimena jungilaro. (Ekzistas nome ankaŭ alia tipo, la tn. kumeta jungilaro). En la sama konkurso venkis niaj jungaĵistoj ankaŭ en 1967. kaj 1969.

La ĉi-jara internacia jungaĵkonkurso en Aachen, aranĝita samtempe kun la Eŭropo-ĉampionado de dresrajdo, finiĝis kun ses hungaraj venkoj. La plej elstaraj jungaĵistoj el ses landoj — Ĉeĥoslovakio, Germana Federacia Respubliko, Pollando, Svislando, Usono kaj Hungarlando — amuzis la ĉ. 50 000-nombran publikon.

Du hungaraj jungaĵistoj, Imre Abonyi kaj Sándor Fülöp, la Eŭropoĉampionaj kondukistoj de du jungokvaropoj sidis sur la koĉersidilo.

En la kvalifikaj kaj dreskondukaj disciplinoj oni aparte taksis la formaciojn kun kumeta kaj kun brustorimena jungilaro. Konforme al la hungara karaktero, niaj konkursantoj startis en la brustorimenaj disciplinoj kaj atingis la sekvantajn eminentajn rezultojn. En la kvalifika disciplino de la jungokvaropoj kaj en tiu de la jungoduopoj, en la dreskonduko de ambaŭ formacioj, krome en la konduko tra obstakloj, kaj en la lerteca konduko la du hungaraj konkursantoj gajnis 6 orajn kaj 4 arĝentajn medalojn.

Krom la ĝojo pro la atingita rezulto — diris d-ro Jenő Váradi, la gvidanto de la hungaraj jungaĵistoj — nin ĝojigas ankaŭ tio, ke nia partopreno en la konkursoj okulfrape levis ties nivelon. Ni jam povas diri, ke la partopreno de Imre Abonyi en la konkurso similas alvenon de kantistogasto en la operejo. Nur pro li preskaŭ duobliĝis la nombro de la publiko, kaj ne senkaŭze. Tempeste li kondukis ankaŭ nun, kvankam la mastroj de la konkurso konstruis tre malfacilan konkursejon. Ekzemple la obstakloj estis nur 30 cm-ojn pli larĝaj ol la malantaŭa radodistanco. Ankaŭ la eleganta kondukmaniero de nia alia konkursanto, Sándor Fülöp kaj lia jungokvaropo, konsistanta el tre belaj, po du kruce jungitaj duonpursangaj nigruloj kaj grizuloj rikoltis unuaniman sukceson.

T. Ujlaky—Nagy

Humuro

En la scienca laboratorio unu eksperimenta muso diras al la alia:

— Kiel mi vidas, vi dikiĝis. Ŝajne vi vivas bone...

— Nu jes. Mi sukcesis dresi la scienculon, kiu pri mi okupiĝas. Kiomfoje mi suprenkuras sur la ŝtupetaro, li donas al mi pecon da fromaĝo.

***

Du viroj, iam infanaĝe bonaj amikoj, renkontiĝas kaj rememoradas la lernejajn jarojn.

— Ĉu vi aŭdis, ke Peĉjo fariĝis literatura kritikisto?

— Min tio ne surprizas. Jam en la lernejo li ne amis la literaturon.

***

Rabiston oni kaptas ĉe freŝa faro. Montriĝas, ke li havas rajtigilon de armo-porto. La motivado de la rajtigo: „Ofte li portas kun si grandan monsumon".

Viro sur parka benko ludas ŝakon kun hundo. Venas promenanto, rigardas la ludon kelkminute, poste komencas krii:

— Senekzemple, senprecendence, mirinde, admirinde. Hundo ludas regule ŝakon...

— Nu, — diras la ŝakludanto —, oni ne devas troigi la miron. Ĵus la hundo perdis unu partion.

***

Kritikisto fama pri sia ĉirkaŭparolemo kaj elturniĝemo edziĝas. La matrikulisto lin demandas:

— Ĉu vi inklinas edzinigi Ilonan Kertész?

— Pri la propono, mi vin petas, mi konsentas principe, sed tamen mi havus kelkajn nepretereblajn rimarkojn.

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO, 1971, 2. La 32-paĝa stencilita gazeto vere meritus presliterojn. Frontpaĝe agrable salutas la pac-poemo de. *L. Jevsejeva;* la du lastaj plataj versoj, tamen, post la antaŭaj, alloge bonaromaj, prefere mankus. La revuo interese montras la grandan evoluon, ekonomian kaj kulturan, de la Balta respubliko. Ĝi raportas, ke pri E-pedagogoj la resp. ministerio mem klopodas zorgi. *A. Skupas,* univ. docento en Vilnjus, en sia artikolo kontraŭdiras "hipotezojn de certaj metafizikaj filozofoj", laŭ kiuj internacia lingvo kreiĝos spontane sub reciproka influo de "grandaj" lingvoj. *A. Vaitalavičius* artikolas pri la vortriĉeco de E-o. Li trovis, ke en E-o la homonimoj estas multe pli malmultaj ol en la etnaj lingvoj, ekz-e en la angla, kaj tio garantias al ĝi pli grandan klarecon. Pri la sinonimoj, li konsentas kun Reformatskij, laŭ kiu ili luktas inter si kaj unu el ili elpuŝas la aliajn, Miaopinie tio ne faras la elpuŝitajn vortojn superfluaj en la literaturo: ĝuste ilia malofteco povas al ili prunti specialan etoson: tiun de stilo "pli alta" aŭ, alifoje, tiun de komikeco. Prave la artikolanto urĝas kreon de sinonim-vortaro.

En LA ESPERO, organo de la Sveda E-Federacio, (1971; 1, 2) artikoleto festas *Magdan Bohman-Carlsson* okaze de ŝia 75-jariĝo; tamen, ĝi ne mencias, ke ŝi tradukis poemojn ankaŭ por la plena E-a Baudelaire-volumo, inter ili la longan "La etaj maljunulinoj". Apude ni trovas de ŝi poemojn originalan kaj tradukitajn el la sveda; ili konfirmas la takson de *Waringhien:* "Ŝia flua kaj klara lingvaĵo diafane redonas la animon de la originala poemo". Al la tieaj bondeziroj plej varmkore ni aldonas la niajn*. — La gazeto raportas pri la distingo de *Andreo Cseh:* la Stokholma Pac-Asocio aljuĝis al li sian lingvan premion por la jaro 1970 "pro unika vivfaro per diskonigo de E-o per Csehmetodaj kursoj en la sveda parlamento". Nia redakcio jene al li sendas niajn plej sincerajn gratulojn.

La recenzoj estas gravegaj en lingvo vivanta precipe en sia literaturo. Por bonaj recenzoj oni devus oferi pli da spaco kaj elserĉi homojn de turnriĉa stilo, lingva kompetenteco, idea abundo kaj ĝusta juĝo. Unu tre esperigan recenzanton mi ĵus malkovris en KOMUNA GAZETO (1971, 7), kie *E. Borsboom,* per sia recenzo pri la granda *Heine*-volumo E-a, montras sin kapabla por verkado de kritikoj eseo-nivelaj (se oni ne domaĝas la spacon por tio). Alia malkovrito estas *F. de Diego* kun siaj recenzoj en la BOLETIN de la Hisp. E-Federacio; precipe li brilas en sia recenzo pri la traduko de la Shakespeare-a *La Tempesto.* Mi menciu, ke HEROLDO DE E-O ne avaras spacon por recenzoj: vd. tiun de *A. Aarse* pri la *Heine*-volumo kaj tiun de *W. Auld* pri la *Petőfi*-poemaro; ĉi lasta povus esti ankaŭ instigo por nia redakcio okupiĝi merite pri la libro.

En HEROLDO DE E-O (1509) ni povas legi la dek tezojn de *Dro W. Bormann.* Ili enhavas multe da saĝo, sed jen kontraŭdiro en ili: la 9-a tezo kondamnas la ebligon de "ĝuaĵoj" (agrablaj klubkunvenoj, internacia atmosfero, kulturaj artaĵoj) kiel "absolute apudan", sed en la 8-a tezo temas ĝuste pri la neceso de tiaj "ĝuaĵoj": alloge redaktataj gazetoj, allogaj kongresprogramoj, por akiro de financaj rimedoj. Mi aldonu, ke per ili oni povus malhelpi ankaŭ la eksesperantistiĝadon, do kuraci la kronikan malforton de la movado. Kaj sen forta movado ni ne povas esti la dezirata "premgrupo kontraŭ la decidrajtaj politikistoj".

LA REVUO ORIENTA ŝajnas eminenta instruilo de E-o por japanoj, kun bone elektitaj amuzaj legaĵoj. Speciala ĝojo por ni estas, ke *trikolumna artikolo en ĝi raportas pri nia revuo.* Tiu bona ekzemplo espereble estos larĝe imitata. Bedaŭre, ĝi estas japanlingva, kaj la saman bedaŭron ni sentis pri aliaj artikoloj, precipe pri tiu de *Kawasaki.*

En LA SUDA STELO. *E.Lapenna* kaj *A.Sekelj* pritraktas la problemon, kiel skribi la proprajn nomojn. Miaopinie, la propra nomo estas netuŝebla propraĵo de sia portanto. Pri *Baudelaire* oni rakontas, ke la leterojn adresitajn al *Beaudelaire* li resendis kun la noto: "adresito nekonata". C. F. *Meyer,* la granda svisa verkisto, meritas, ke oni skribu lian nomon tiel, kiel li mem ĝin skribis, kaj tion saman meritas ankaŭ M.J. *Mayer,* la granda natur-esploristo, H. *Maier,* germana filozofia aŭtoro kaj ankaŭ L.E. *Meier,* malgraŭ siaj participoj. Memorinde. ke *Rollet de l' Isle,* iama prezidanto de la Akademio, proponis skribi la proprajn nomojn laŭ la originala grafismo kaj prefere prononci ilin laŭlitere, se oni ne scias la prononcon, do *Bordeaux = Bordeauks.* Se la prononco ne estas ebla, oni ellasu la neprononceblajn konsonantojn: *Schmidt = Smid.* Interese, ke la rusaj esp-istoj uzas ĉi tiun metodon: ili ne zorgas pri tio, ke ekz-e *Orel, Soveta, Onegin,* prononcataj laŭlitere, sonas alie, ol el ilia buŝo.

En THE WORKER ESPERANTIST (La laborista E-isto) la "lingva angulo" laŭdinde montras la lertonsperton de *W. Prent.* La gazeto petas pri kritiko, mi diru do provizore, ke la artikolo de *L. Dighbert* (1971. Nro 225) estas modelo de reakcia demagogio. Kial kaj kiel, tion, pro spacmanko, mi eksplikos venont-numere.

*Dolorkonsterne ni sciiĝis de tiam pri ŝia morto.

Najbareco, amikeco

POLLANDO

El LA POLA ESPERANTISTO (Nro 2-a) ni sciiĝas, ke ĝi, post kelkjara stagnado, ree aperos regule dumonate, kaj ke la Pola E-Asocio havas novan statuton kiu ebligas reorganizon de la Asocio kaj donas novajn eblojn de agado laŭ la postuloj de la nuntempa Pollando. La Pola Esperantisto, krom valoraj artikoloj politikaj, kulturaj, literaturaj, informas pri granda movado nomata "La kastelo de nia fiero". La registaro decidis rekonstrui la Reĝan Kastelon en Varsovio. Kial? Ĉar ĝi memorigas brilajn tempojn de paseo. Tempe de la lasta reĝo, Stanislavo Aŭgusto Poniatowski, en ĝi naskiĝis, maturiĝis kaj realiĝis ideoj kaj institucioj, kiuj levis Pollandon sur nivelon de plej progresema lando koncerne edukadon kaj kulturon; tie funkciis la unua ministerio en la mondo: Komitato de Nacia Edukado; tie oni proklamis kaj akceptis la plej progreseman konstitucion de la Tria de Majo 1791. Tial ĉiuj poloj de la lando, kaj ankaŭ tiuj dissemitaj en la mondo, volas kontribui al la renovigo de la glora Kastelo. Al la kampanjo aliĝos ankaŭ esperantistoj polaj kaj alilandaj. Ni kore salutas la Polan E-Asocion, kun kiu la Hungara EA faris ĉi-jare fruktodonan kulturan kunlabor-kontrakton. Tiu kontrakto devigas ankaŭ nin sendi kelkajn brikojn por la rekonstruo de la grandpasea Kastelo.

Inĝ. Ferenc Egry

ĈEĤOSLOVAKIO

La tria kongreso slovaka okazis en Košice, en Junio; ĝin partoprenis ĉ. 150 esp-istoj, inter ili kvar el Hungario, unu el Orienta Germanio, unu el Pollando. Alparolis ankaŭ *Elza Takács* el *Csorna* (Hungario). La kongresanoj povis spekti du pup-teatraĵojn, kiuj gajnis la unuan premion en la Internacia Pup-festivalo Zagreba. Permesu, ke mi danku por la invito kaj la gastigado kaj la agrabla travivaĵo. — En la Kongreso dro *Izák* kaj s-no *Rybin* anoncis, ke en la printempo de 1972 oni organizos en *Jasná* (Slovakio) internacian ski-konkurson por Premio de Granda Demanova. Ili petas aliĝi esp-istojn, kaj ne nur skiantojn: gravas ĉeesto de multaj esp-istoj. Pluaj informoj estas riceveblaj de Korpeduka Kooperativo en *Jasná*. Adreso: Televychovná jednota. Jasná, ul. 1. Maja. Lipt. Mikulás.

L. Földvári

SOVETUNIO

La Esperanta movado en Moskvo kaj en la tuta Sovetlando ĉiam pli progresas. En multaj urboj reviviĝis la E-ista aktiveco, precipe en la apudbaltaj regionoj (Estonio, Litovio, Latvio kaj Kaliningrada regiono). En Estonio aperis bona esperantlingva broŝuro "Soveta Estonio", jam plene disvendita. Litovoj aperigis riĉenhavan kajeron "Horizonto de Soveta Litovio", kaj sendis ĝin al ĉiuj esperantaj revuoj. La latvaj esperantistoj okazigis ĉi-somere en pitoreska loko de norda Latvio — Smiltene — la XIII-an B E T. Ne malpli grandan sukceson oni vidas ankaŭ en Ukrainio, kie aperis bona etnografia broŝuro "Ukraina Soveta Socialisma Respubliko" en traduko de S. Mizeruĥa. Tie estas regule eldonata ankaŭ la riĉenhava revuo "Tra Soveta Ukrainio". Sed la ĉefurbo Moskvo, sendube, en tio okupas la unuan lokon.

Teodoro Kulagin

En Esperanta Klubo ĉe Domo de Instruistoj en Ĥarkov (Ukrainio) okazis internacia prilerneja ekspozicio. Sur 15 tabloj — standoj — ni montris al vizitantoj la eksponaĵojn de 16 lernejoj el 14 landoj kaj sur 1 tablostando infanan korespondaĵon de la loka lernejo kaj kajerojn de "Grajnoj en Vento" (komuna revueto de 20 lernejoj el 20 landoj de l'mondo). La devizo de la ekspozicio estis: "Super la kapetoj de l'tutmonda infanaro estu ĉiam hela ĉielo", esprimita per la vortoj de fama soveta kanto: "Estu ĉiam suno, estu ĉiam ĉielo, estu ĉiam patrino, estu ĉiam mi mem". La celo de la ekspozicio estis: per ĝi penetri en la medion de laborantaj profesiaj instruistoj, varbi ilin por povi en nia urbo komenci la instruadon de Esperanto en lernejaj E-rondetoj.

Iv. BRIL, prez. de E-klubo, Ĥarkov.

E. A. BOKAREV

1904—1971

La E-a movado suferis grandan perdon: la Moskvaj esperantistoj akompanis sur la lasta, senrevena vojo sian eminentan gvidanton Evgenij Aleksandroviĉ BOKAREV, mortintan subite pro koratako en sia 67-a jaro, je la 11. de Marto 1971. Doktoro de filologio, scienculo de la Kaŭkazaj lingvoj, membro de Akademio de Esperanto, li estis dum multaj jaroj ĉefo de la Sovetaj espistaj delegacioj ĉe Universalaj E-Kongresoj kaj konferencoj. Sub lia redaktado pretiĝis Rusa-E-a kaj E-Rusa Vortaro, el kiuj la unua aperis en 1966. Neniam forgeseblaj estas lia fervora por-E-a agado kaj granda merito en la afero de paco, interhoma amikeco kaj frateco.

Li naskiĝis la 25-an de Februaro 1904; lia patro estis instruisto en la malgranda diversnacia lando Dagestano. El tio estas kompreneble, ke li dediĉis sian vivon al la studado de la nordkaŭkazaj lingvoj. Lia verko "Al problemo de terakaj lingvoj" havas mondskalan signifon. Probable la multingveco de lia lando kondukis lin ankaŭ al E-o, kies pasia adepto li estis ekde sia junaĝo.

En la Patridefenda Milito li batalis kiel soldat-volontulo. Defendante Leningradon, li vundiĝis grave. Post lia resaniĝo oni volis lin revenigi al lia evakuita scienca instituto, sed li rifuzis tion kaj militservis ĝis la militfino. En 1947 li revenis hejmen kiel majoro, kun multaj militordenoj.

Ĉirkaŭ li regis atmosfero de puro, honesto, sincera helpemo kaj eksterordinara modesto. Li estis homo de naturdevena nobleco, ĉarmo kaj takto. Li mortis klasike bele, ĉe sia skribotablo, farante la lastajn korektaĵojn de la E-Rusa Vortaro, ĉeeste de eldoneja redaktoro, vere, sur posteno de esperantisto, fidela ĝis la lasta spiro.

Antaŭ lia kremacio, la adiaŭan solenon ĉeestis multaj esperantistoj; paroladoj menciis la meritojn kaj sciencan signifon de la forpasinto, gardanta en la ĉerko sian bonaniman rideton. Inter la florkronoj estis tiu de Moskvaj esperantistoj, kun verdaj rubandoj kaj E-a surskribo.

Laŭ *T. Kulagin* kaj *N. Sulje*

AURÉL PONORI THEWREWK

ESTU HOMO

Estu homo ĉi-epoka
aŭdu la pafon
ie ajn tondrantan
iun ajn trafantan
ĉu partizanon
ĉu prezidanton
vidu la ridon
la ardan larmon
ĉu blankan
ĉu nigran
estu homo ĉi-epoka
trasentu saton-malsaton
el dek- kaj dekmil kilometroj
viaj parencoj
gefratoj gepatroj
loĝu dek- kaj dekmil kilometrojn fore
ĉie
vi loĝu ĉie
vi estu ĉiu homo
volu esti nur homo
homo ĉi-epoka
ne timu
ja vere
viaj suferoj miliardiĝos
vi suferos kun ĉiuj
sed pripensu
vi ĝojos kune kun ĉiuj
kaj trasentos la felicon de miliardoj de ĉiuj
tial estu homo
vera homo ĉi-epoka
Homo

REMEMOROJ

Kiel sala estis la pramaro?
Mia sango gardas tion,
ĝi rememoras.

Kiel varma estis la pramaro?
Via haŭto gardas tion:
ĝi rememoras.

Kiel arda estis la praamo?
Nia kiso gardas tion.
Mi rememoras.

DEZIRO

Vi estu stranga-dolĉa viv-odoro,
kaj mi la naz', flarante nure vin,
mi estu sekiĝinta ĝis la koro,
vi estu refreŝiga, pura vin'.

Vi estu sfer-muziko de l' orgeno,
kaj mi orel': ravita aŭskultant',
vi estu varma-mola velur-eno
kaj mia polmo ties karesant'.

Vi estu gusto de l' anim' amanta,
kaj mi la lango retrovanta vin
kaj tabaker' en ardo ekflamanta —
kaj sencodona fajro via sin'.

Filmo pri la „stress" kaj ties scienculo

Nia revuo jam publikigis konigan artikolon pri la "stress" de la organismo, t.e. pri ĝia alarmita stato, streĉa stato, kaŭzata de diversaj ŝokoj ĝin trafantaj, kaj pri János SELYE, hungardevena scienculo vivanta en Kanado, kiu studis ĉi tiun staton kaj ĝiajn konsekvencojn. Nun la hungara reĝisorino *Judit Vas* pretigas filmon pri tiu malkovro kaj pri la malkovrinto, prezentante la vivon kaj laboron de J. Selye, lian ĉirkaŭaĵon, liajn kunlaborantojn. Tio inkluzivas ankaŭ montron de preskaŭ ĉiuj problemoj de la nuna medicino, ĉar la esplor-agado de J. Selye ne estas disigebla de la tutmondaj esploroj kaj studoj.

La kvarpersona filmofara grupo revenis post preskaŭ kvarmonata restado en la Kanada Instituto de Pliperfektigo de Kuracistoj en la kadro de la Universitato de Montreal. Tiu instituto de Selye havas internacian karakteron: tie laboras ankaŭ tri hungaraj esploristoj. La filmo montras la funkciadon de la instituto, la laboradon de la tieaj laborgrupoj, de tempo al tempo ŝanĝiĝantaj laŭ la postulo de la laboro, kaj la laboron de J. Selye, centra figuro de la filmo, kies disĉiploj estas ĉiuj esploristoj kaj kiu donas la esencon, taskon kaj bazon de tiu scienca laborejo. Ĉi tio, tamen, estas nur parto de la filmo. Oni demonstras en ĝi ankaŭ la stres-teorion, por forigi miskomprenojn kaj malĝustajn konceptojn pri ĝi. La teorio ja fariĝas pli kaj pli grava por la medicino, eĉ por la klarigo de problemoj trans la medicina scienco, ekzemple pri la stres-efikoj en la familia vivo, en la infanaĝo, ĉe maljunuloj.

Selye apartenas al tiuj raraj esploristoj, kiuj rigardas la tuton de la homa vivo, ne nur detalproblemojn. Al lia nova libro "In vivo" la antaŭparolon verkis Albert *Szent-Györgyi,* la fama Nobel-premiito. Tiu deklaras, ke la vivo estas la propreco de la tuta korpo, kaj kiu serĉas respondon je la demandoj de la vivo survoje de la molekula biologio, tiu forgesas ĉi tiun bazan veron. La biologia esploro de la tuta organismo, de la supermolekula tuto restos ĉiam tre grava: rezignante pri ĝia esploro, oni ne povos krei el partoj la tuton. Ekzistas scienculoj studantaj kaj eble solvantaj problemojn, kaj scienculoj trovantaj problemojn; al ĉi lastaj apartenas Selye. "Tiuj ĉi pensoj kreis la koncepton kaj strukturon de nia filmo — diris la reĝisorino —, kaj tial, krom la partoj konigantaj la esplorojn de profesoro Selye kaj la laboradon de lia instituto, ĝin movas ankaŭ la pensoj, kiuj analizas la vojojn kaj eblaĵojn de la scienco. Multe helpis en tiu laboro ankaŭ la profesoro mem, kiu estas ne nur subjekto de la filmo, sed oni povas lin nomi kunreĝisoro, ĉar li mem klarigas ja la tutan laboron esploran kaj instititan".

Ni esperas, ke la filmo baldaŭ estos videbla en multaj landoj de la mondo. Kaj ĝi ne sole konigos al ni sciencajn malkovraĵojn, sed samtempe instruos nin, kiel vivi prudente kaj kontente, kiel dresi kontraŭ ekscito nian cerbon kaj niajn nervojn. Se nur nia tuta Globo lernus el ĝi, ke ĝi ne tenu siajn loĝantojn en ĉiama alarm-preteco de konstante rifuĝi preta leporo.

P. B.

RECENZOJ

MODERNAJ HOMOJ PAROLAS... kompreneble Esperanton, sed pri tio oni devas tiujn homojn *konvinki per modernaj propagandiloj.* Modele servas tion la *okcidentgermana eldonaĵo* kun supra titolo de la tieaj samideanoj (40 paĝoj) per konvinkaj argumentoj kaj lerta redaktado. Ĝi estas kvazaŭ eta enciklopedio pri E. kaj movado, iomete komparebla kun la hungara eldonaĵo "Mi konatiĝas kun E.", tamen laŭ la cirkonstancoj pli bildhava kaj gravaspekta.

La nederlanda grandparte grafika varbilo (32 pp.) *"La minacanta lingvoproblemo"* laŭdas la redaktoron: HANS BAKKER, certe la plej sprita propagandilo. Novaspektaj grafikaĵoj kunmetaĵoj parolas-argumentas okulfrape, prezentante la avantaĝojn en la moderna industria, urba vivo pere de E. Vortoj apenaŭ... la situacio drasta urĝas: *ne dronu en kaoso!*

GERIATRIO kaj la ĜENERALA ZORGO POR GEMULTJARULOJ de univ. prof. J. Th. R. Schreuder kaj d-rino A. Diatlowicki—Tobi. Trad. F. F. *Faulhaber.* Eld. FLE, Nederlando. 44 pp.

Maljuniĝi estas pli kaj pli "malfacila" afero en niaj plirapidiĝintaj tempoj, kio memkompreneble donas pli da zorgoj kaj bezonas pli da atento de ni ĉiuj, kiuj intencas "iam" esti maljunaj. Eĉ post la pensiiĝo la moderna socio bezonas la maljunulajn spertojn kaj partoprenadon, kaj la moderna scienco-branĉo, la geriatrio, okupiĝas pri la plilongigo de la utila, vere homa vivado. La verko analizas la situaciojn tansformiĝantajn dum maljuniĝo, kaj konkludas prave, ke socio, familio kaj maljunulo devas *kune* zorge gardi la *memstarecon* de la multjarulo. Nome, tenante la financan, socian kaj korpan memstarecon estas eble konservi la respekton al la multjarulo (kaj lian por si mem), eviti rapidajn devaloriĝojn. Inter aliaj ni trovis tre interesa, ke la aŭtoroj forte kontraŭargumentas la kutiman litripozon, kaj malkonsilas ĝin eĉ por malsanulo. Utila studindaĵo por ĉiu, kiel alproksimiĝi al la supraj celoj kaj preventi la perdon de la plurfaca memstareco, la minacojn de la multjara stato.

PETR BEZRUČ: SILEZIAJ KANTOJ. El la ĉeha trad. *Tomáš Pumpr, Jiri Korinek kaj Rudolf Hromada.* Eld.: Distr. Pop. Biblioteko, Opava. 124 pp.

Unusola, profund-pasia veo-krio ŝajnas esti tiuj poemoj, kaptantaj per eksterordinara forto siajn legantojn. La ĉeha poeto-grandulo deproksime konis la tragikan situacion de la sileziaj ĉehoj, ilian subfeŭdisman mizeron,denaciiĝon kaj pereadon; kaj en liaj baladece premaj versoj kvazaŭ resonas la peza spiro de la malespera kaj ribela popolo, kies suferojn tiutempe eĉ pliiĝis la proletariĝo pro la komencanta kapitalismo. La *Karboministo* rajte famiĝis kiel leviĝanta pugno de ĉiuj humiligitoj kaj ekspluatatoj. Arda humanismo kaj sociala kunsento traflamas ĉiujn versojn de Bezruč. Kiel majstron de la balado montras lin poemoj, fortaj je emocio, plenaj de akraj bildoj de helo-malhelo, kiaj Maryčka Magdon, Bernard Zár. En ĉi dense mallonga vivoverko, kia tre malofte troviĝas en la mondliteraturo, oftas sugeste strangaj bildoj, kaj efike trafas la artisma koncizeco de la poezia parolo.

Recenzo kapablas sentigi nek voĉon, nek tonon de tiu grandioza poeto. Estu danko al la tradukintoj, kiuj spite al la peza popola lingvo de Bezruč, savis por ni la plej gravajn poeziajn valorojn. La Sileziaj Kantoj sukcese vastigas nian mondliteraturan trezoron E-an.

E. Fenyvesi

Retoriko

Kun aparta konsidero al esperantlingva parolarto. Tria eldono. Du partoj: I. Lingvo — II. Retoriko. Verkita originale en la Internacia Lingvo de Prof. D-ro Ivo Lapenna. *Antaŭparoloj de Reto Rosetti kaj G. Waringhien. 4.500 ekzempleroj de la Unua kaj Dua eldonoj jam delonge forvenditaj. Tole bindita, 294 p. Prezo 20 Gld. aŭ egalvaloro.*

Prof. G. Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, skribas en la antaŭparolo: "En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko."

En la Rimarko pri la Tria Eldono la aŭtoro skribas: „Kiel aŭtoro mi havas la kompreneblan esperon, ke Retoriko estos same bone akceptota de la novaj legantoj, kiel ĝi estis de la antaŭaj; kiel multjara laboranto de la Internacia Lingvo mia sola deziro estas, ke ĝia enhavo inspiru kaj stimulu al pli konvinka kaj sindona agado por Esperanto."

La Tria Eldono estas represo de la Dua Eldono, en kiu estas farita korekto de preseraroj kaj nur 2—3 malgrandaj ŝanĝoj.

Alberto Fernandez: SENĜENAJ DIALOGOJ

La subtitolo de la verko „Popularscienca esploro de fundamentaj demandoj" klare montras la intencon de la Aŭtoro: popularigi certajn fundamentajn ideojn de la nuntempa scienco. La verkisto ne donas fundan ekzamenon aŭ sisteman priskribon de la prezentitaj temoj, sed modeste kontentas kun la celo: veki interesiĝon pri sciencaj demandoj de jam parte instruita leganto. La formo de la pritraktado estas dialogo. El 20 dialogoj inter onklo Terano kaj liaj genevoj (18-jara Pensuto kaj 16-jara Dubinja) ni ekscias tre interesajn kaj surprizajn detalojn ekz. pri la gravito kaj pezo, pri ordinara materio kaj „antimaterio", pri la rilato de la Einsteina relativecteorio al la klasikaj moviĝleĝoj de Newton. Mire ni aŭdas, ke la Tempo ne disigeble estas ligita al la Materio, kaj se tiel estas, rajte metiĝas la demando pri la origino kaj atomeco de la Tempo. Ege alloga estas la konversacio pri la Determinismo, pri la tronperdo de ties longe suverena teorio, pri la konsisto de la mikromondo. Daŭrigo de nura denombro de la variaj temoj diskrevus la kadrojn de recenzo, ĝuste tial sufiĉu nur la lasta problemo: kien progresas la homo.

La Aŭtoro atingis sian celon. Li sukcesis ekstreme streĉi la interesiĝon de la leganto. Lerte kaj sprite li kondukas siajn genevojn al plena kompreno de la problemoj tre ekscitaj. Por la leganto kaŭzas apartan ĝuon la flua, senriproĉa stilo kaj la eblo alproprigi E-lingvajn terminojn, kies kono decas al espisto ankaŭ de meza erudicio.

STAFETO meritas laŭdon pro la eleganta, tipografie unuaklasa eldonaĵo ilustrita per multaj modernaj grafikaĵoj de flandra artisto Jan Verwest.

my

POR TURISMO UZU MOTOR-BICIKLON PANNONIA DE TIPO T 5

Ekonomia, fidinda, kun longa vivdaŭro

PANNONIA T 5

Nombro de cilindroj:	1
Cilindrokapacito:	247 cm³
Povo:	16 Ĉp
Maksimuma rapido:	110 km/h
Konsumo (de benzino):	4,2 l./100 km

P 10

Funkci-sekura, komforta estas Pannonia de tipo P 10. Karakteriziloj: Alte situanta stirilo, larĝ-ripaj cilindro kaj cilindrokapo. Senbrua, fidinde voj-adhero, eminenta por longaj veturoj.

Nombro de cilindroj:	1 (returna brulgasforigo)
Povo:	247 cm³
Maksimuma rapido:	18 Ĉp
Akceliĝo:	110 km/h
Konsumo:	4,2 l./100 km ĉe 70 km/h-a rapido

P 20

Ĉu vi ŝatas la rapidon? Per Pannonia de tipo P 20 vi povas atingi rapidon de 135 km/horo, – ĝi konsumas nur 4,2 litroj 100 km da benzino. Ĝia akceliĝo estas sur monda nivelo. El starpozicio ĝi akceliĝas je rapido de 100 km/h en 9,6 sekundoj. Ĉe ĝia granda rapido tamen maksimuma komforto, risortado kontentiganta ĉiun deziron.

Nombro de cilindroj:	2 (returna brulgasforigo)
Cilindrokapacito:	23 Ĉp per benzino de oktana nombro 92
Povo:	20 Ĉp per benzino de oktana nombro 86
Maksimuma rapido:	135 km/h
Akceliĝo:	0— 50 km/h dum 30 metra vojo
	0— 80 km/h dum 90 metra vojo
	0—100 km/h dum 184 metra vojo
Konsumo:	4,2 l./100 km ĉe 70 km/h-a rapido.

EXPORTISTO

Entrepreno por internacia komerco

BUDAPEST, 62. PO.B. 354

El la leteroj

Permesu al mi esprimi mian senrezervan ĝojon pro Hungara Vivo: ĝi estas por mi nemalhavebla. Precipe plaĉas al mi „Revuo de revuoj" kaj la sobraj kaj altnivelaj artikoloj pri Esperantujo kaj pri la esperanto-vivo en via lando. Kun sinceraj salutoj: P. V. Bagger, Uglebakken, Jyllinge, Dk 4000 Roskilde. Danlando.

Estante abonanto de HV ekde ĝia unua n-ro, mi la revuon ne malmendis dum dek jaroj, jam tio mem pruvas, ke mi trovas en ĝi plezuron, malgraŭ tio, ke mi vivas en najbara lando kaj scias ne malmulton pri Hungario, ankaŭ multon edifan. En la lasta tempo mi ĝoje konstatas en HV aperon de polemikaj temoj — kredu, ili estas necesegaj kaj espereble helpos kontraŭ stagno... Antaŭĝojante je la venontaj kajeroj mi deziras al vi multe da persistemo kaj optimismo. Kun samideana saluto via slovaka leganto: Eduard V. Tvarozek, Hodzava 1939/6, Trenĉin.

Nun ĉio estas en bona ordo, mi posedas ĉiujn dek kompletajn jardekojn de via ŝatata kaj bela revuo. En la unua numero de la kuranta jaro mi povis legi artikolon pri la Internacia Ekslibris-Kongreso en Budapest — temo, kiu tre interesas min, ĉar mi mem estas ekslibrisŝatanto... Mi tre deziras havi kontakton kun esp-isto, ekslibrisŝatanto en via lando, eble kun iu el la Hungara Etgrafika Rondo Amika. Danke kaj amike via: Metodi Panĉec, Sofia 7, Str. „Persenk", Blok 16, Vhod II. Bulgario.

Leterkesto

Anoj de E-KLUBO en RIGA; Jozefo RABI, Székesfehérvár; SCIENCA RONDO E-ISTA de la Universitato Eötvös Lóránd en BUDAPEST kaj iliaj geamikoj el GDANSK. Varman dankon por la sincera rekono, saluto kaj bondeziroj.

S-ino Asta CHRISTENSEN, Blankary 33/v. DK—2500 VALBY. Kopenhago. Dankon por via letero, en kiu vi varme aprecas la libron „Vuk" de I. Fekete, gajnitan ĉe konkurso en la Radio de Budapest. Laŭ via demando ni sciigas, ke de I. Fekete aperis E-e krome nur la noveleto „Julio" en H. V. 1968/4. Laŭ via propono, ni klopodos publikigi verkaĵojn de I. Fekete ankaŭ estonte.

Aulo MINELL, Tikkakoski, Finnlando; Ludoviko ZGIRSKI, Jastrawie, Pollando, Viajn komunikaĵojn, ricevitajn malfrue, ni ne povas publikigi, bedaŭrinde.

ATENTU, karaj legantoj. Ni devas transdoni la manuskriptojn al la presejo 5 monatojn antaŭ la apero de la numero. Tial ni petas, bvolu sendi vian skribon ĝustatempe. Kaj almenaŭ vian nomon kaj adreson bonvolu skribi precize kaj legeble, ĉar ni ne estas apotekistoj kapablaj deĉifri eĉ manskribojn kuracistajn. Ĉu vi konsentas? Dankon.

KORESPONDI DEZIRAS

Heinz Lichterfeld, 1534 Kleinmachnon, DDR. Im Tal 26. El tuta mondo filatelistoj, li interesiĝas pri literaturoj, popolartoj ktp.

Vello Pau, Viljandi, pk. 33, Estonio, Sovetunio. K. d. kun 14—25 jaraj genujunuloj. Literaturo, muziko, sporto, E-movado ktp.

Janusz Tomczak, Zielona Gáva, ul. Lisia 8/m 4. Lingvoj, pm., bk.

Mátik, Meci-Anna, Estonio, Tallin 16, Táhe 5ª 2. 20 jara junulino. Turismo, muziko, historio, arkitekturo, geografio ktp.

Boris Nikolov Georgiev, Bulgario, urbo Ruse, str. Ĉernorozec Hrabar N. 7. Kun ĉiuj pri ĉiu junulara temo.

Lajos Ádok Földeák, Martinovics u. 5. Hungario. 21 jara. Ĉasado, naturo.

Ryszard Górski, Nowy Tomyŝl, ul. Tysiaclecia 3 a woj. Poznan, Pollando. 18 jara lernanto. Muziko, literaturo.

Jolán Józsi, Rumanio, Odorhei, str. Republicki-Spital Bloc Ba et. I. ap. 14. 24 jara tajpistino. E-movado, arto, lingvoj, turismo, muziko.

Lidia Jarygina. USSR. Perm 17. ul. Kim. 97—40. 23 jara inĝenierino. Pri ĉiu temo.

Vytautas Mukas, USSR Litovio, Vilnius-C Poŝtkesto 160. 32 jara ekonomisto. Pri ĉiu temo.

Marian Kijak, Pollando, Skanysko-Kam. Granicza 26/11. woj. Kieleckie. Mezlernantino. Muziko, sporto, filmo, ktp.

Francisko Sógor, Sopron, Csengery St. 81. III. 11. Hungario.

Ryszard Mishalski. Pollando. Zielona Góra, str. Wiŝniowa 38. 1. 19. Juna radioamatoro. Foto, kb., pm.

Hans Flassbeck, 53 Bonn I. Poŝtfako GFR.

Juras Gubaras, P. O. Box 444. Kaunas — 2 Litovio USSR. 25 jara studento, elektroteknikisto. Foto, turismo, bk., pm., ktp.

Evgeni Georgiev, Bulgario, Sofia 2. str. „Baĉo Kiro" 35. II. koop. 15 jara.

A. Bulgakov, USSR, Kazan 80. Volgogradskaja 19—2. 30 jara oficisto. Gramofondisk. rekompenco ktp.

Valja Mymrina, USSR Perm 67. ul. Vagonnaja 7. kv. 25. 18 jara studentino;

Luda Svareva, USSR Perm 3, ul. Tramvajnaja 5. kv. 1. 18 jara;

Luda Ovsjannikova, USSR Perm 3, u. Tramvajnaja 17, kv. 3. Arto, literaturo, turismo. Ili ŝatas la vivon.

Atentu! La redakcio petas la legantojn, ke la nomon kaj la adreson bonvolu skribi per presitaj literoj en la leteroj, ĉar la adresojn oni miskribos (eble miskribis).

ESPERO EN ESPERANTO

Nia ĉefkunlaboranto: LAJOS TÁRKONY, la konata poeto kaj recenzanto verkis sonetojn kun titolo „ESPERANTO". (Ili aperis ankaŭ en Hungara Vivo en 1969.)

La unua soneto komenciĝas per laŭdo: — "Vi naskas por la mondo multajn bonojn..." — kaj post kelkaj poetaj pensoj la poeto esprimas sian esperon.

Vidu en la vicoj: 1. horizontala kaj 21. vertikala.

Horizontalaj vicoj: 13. Brulego, 14. Nedifinita adjektivo, 15. Miksita ilo! (oleo en angla lingvo), 16. Sufikso esprimanta la malplej altan grandon, 17. Negacio, 18. Kaj tiel plu, 20. Havanta altajn moralajn kvalitojn, 21. Poseda pronomo, 23. Granda river', 26. Miksita ino! 27. Nomo de latina litero X, 29. "Alia tempo, aliaj..." 31. OT, 32. Neatendita kaj riska neordinara okazintaĵ', 34. En la lingvo de Cervantes, 37. Grasan porkaĵon, 38. Persona pronomo, 39. Ekzemple: flav' 40. Vira rob', uzata de juĝistoj, 42. Plezurvojaĝi per ŝipeto, 44. Statuo, figuro de diaĵo, 46. Kiel la vico 16. horizontala, 47. Eksploda manarmil', 49. Stat' post malsano, 51. Kleriko helpanta al sacerdoto, 52. AF, 53. Fariĝi posedanto (nur radiko) 55. Sendependa lando sur la Arabia duoninsulo, 56. Solidiĝinta koloida solvaĵ', 58. La pripensita procedar' (artikolo kaj radiko), 60. Malgranda, 61. Spirita, viviga principo de la homo, 62. Sufikso kun adjektiva finaĵo, 63. Radiumo, 65. OC, 66. SDU, 67. Supernatura estaĵ', 69. Malsama problemo, demando (du vortoj)

Vertikalaj vicoj: 1. Demanda adverbo, 2. Pratempa, 3. JC, 4. Rezinoriĉa lign', 5.... ta: ne havanta propran movon, 6. ED, 7. Dolĉa drinkaĵ', 8. ... io: hazardludo, 9. Greka litero, 10. Organ' en la buŝo, 11. Nomliteroj de Paĉjo (elparolite), 12. Duiliono, 19. ... -icio: malpermeso importi aŭ eksporti (ekzemple alkoholaĵon), 22. Firme certigos, 24. Tute ŝirmita kontraŭ infekta malsano, 25. EJI, 28. Malglata harar' de ŝafoj (du vortoj), 30. Butiko kie oni vendas medikamentojn, 33. Teksaĵon faritan el lino aŭ kanabo, 35. ... bo: koleoptero, 36. Alias, 41. Politika sistemo, 43. Akuta angulo formata de du renkontiĝantaj samaj kurblinioj, 45. Helpu iamaniere kontraŭ atako, 48. Scienculo okupiĝanta pri la strukturo de la organismoj, 50. IRA, 51. Poparta, 54. Imperiestr', 57. Malnova kordmuzikil', 58. Malgranda angla kaj germana mezurunuo de peso, 59. Teksaĵ' el lano uzata por vestoj, 64. ... ki: komenci batalon kontraŭ malamiko, 68. Reen: persona pronomo, 70. Sufikso esprimanta seksson, 71, Sufikso esprimanta abstraktan ideon.

FERI



Sendu al ni la solvon de la citaĵo. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

La solvo de enigmo aperinta en HV 1971/2 tekstas:

"Pluvivu kun kanto, /pluiru tra l' mondo
poeto-migranto,/ poet-vagabondo"

Libropremion gajnis: Zdenek Hršel, Botanicka 28., Brno, ČSSR; Teodoro Löwenkopf, Maagan, Emek Hayden, IZRAELO; Klub "Esperanto" przy Domu Kultury Mystowice, Grunwaldzka 7. POLLANDO

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: F-ino N. Hanson el ANGLUJO, Aleŝ Bednarik, Barta Frantiŝek, Miroslav Hromas kaj Adolf Staňura el ČSSR; Jürgen Berndt, Rainer Fischer, Frohmut Kaller kaj D-ro Martin Schüler el GDR; inĝ. Ferenc Egri, Péter Erdős, Róza Halász, Ildikó Kerékgyártó, János Kiss, József Lőrinczi, Károly Magyari, Magdolna Marassy, Tibor Papp, kaj Károly Törley el HUNGARIO; Jadviga Paŝkieviĉ el POLLANDO; Julio Csapó kaj Julio Szabó el RUMANIO; Aleksandro Vajsberg el SOVETUNIO; Hugo Löfgven el SVEDIO. József Biró, Hungario, Ilse Neumann, Linde Knöschke el GDR., Viktor Arolovič, el Sovetunio.

AL NIAJ ENIGMO-SOLVANTOJ

Pluraj el niaj legantoj plendis pri la troa malfacileco de niaj krucvort-enigmoj. Por kuriozaĵo, ni prezentas al vi interesan missolvon de la enigmo en H.V. 1970. 3. La ĝusta solvo, parto el poemo de Endre Ady en la traduko de Emba, estas:

Vi tronu brile, ruĝa stelo.
De kiam sentas hom' mizeron,
ruĝa stelo donis esperon.

Kaj jen estas la ensendita missolvo:

Vitro, nutrilo, muĝa stepo,
de kiam sekvas hom' mil eron,
muĝa stepo doni meso-eron.

La solvinto pensis, ke temas pri surrealisma, dadaisma poemo, almenaŭ li konjektis tion, ne sciante certe.

Por eviti tiajn „katastrofojn", ni donos pli da helpo al la cerbumantoj. La t.n. „fermitajn literojn", t.e. literojn ne solveblajn pro manko de perpendiklaj vicoj, ni enskribos en la respektivajn kvadratojn, kaj ni signos ankaŭ kelkajn interpunkciojn (kriosignojn, divido-strekojn ks.). Eĉ, ni metos apartigajn signojn inter la vortojn.

Agrablan amuzon deziras:

FERI

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando. KULTURA Budapest, 62,P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AUSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A — 1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A — 1011, WIEN I.

AUSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21 — 105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 32-a paĝo!

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

1971. XI-a jaro, 4-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csiszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, D-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo.

La abono estas por jaro Ft 32.—, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

71.6825 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5 ● Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj ● Farmaciaj bazmaterialoj ● Vakcinoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj ● Veterinaraj drogoj ● Furaĝaldonaĵoj ● Laboratoriaj kemiaĵoj ● Biokemiaj produktaĵoj ● Radioaktivaj produktaĵoj ● Volatilaj oleoj ● Kuracplantoj ● Resanigaj kaj amaraj akvoj

HUNGARHOTELS

IMFORMADO

RAJD-PREZENTADOJ
VINGUSTUMADOJ

ORGANIZO DE
BANKEDOJ, NUPTOFESTOJ

ORGANIZADO ARANĜO DE
KOKTELPARTIOJ
PRESIO-AKCEPTOJ
KONGRESOJ

ĈAMBROMENDO
MONŜANĜO
TABLOREZERVO

BUDAPEST

V. Petőfi Sándor utca 16.
Tel.: 383-117, 180-642 Telex: 22-4923